der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang Nr. 144 (4/1987) ISSN 001 4-0619 30 Pf

750 jaroj Berlin

En 1987 Berlin solenas la 750an datrevenon de la unua dokumenta mencio de la urbo.

750 jaroj Berlin — tiuj estas trikvarona jarmilo de ŝanĝoriĉa historio de urbo kaj de ĝiaj enloĝantoj, kiu estas ligita kun la germana kaj multe kun la eŭropa kaj la monda historioj. Dum jarcentoj Berlin estis areno de akraj bataloj inter progreso kaj reakcio, inter la fortoj de la paco kaj de la milito. Sian 750an datrevenon Berlin solenas kiel ĉefurbo de Germana Demokratia Respubliko, de la socialisma germana ŝtato, en kiu la paco estas plej ĉefa principo de la ŝtatpolitiko.

Direktata al la estonteco la socialisma Berlin estas enradikiĝinta en la riĉaj multspecaj tradicioj de 750jara historio. Ĉi-tie estas konservitaj la rezultoj de peniga laboro kaj de ŝanĝoriĉaj bataloj de laborulaj klasoj kaj tavoloj dum multaj jarcentoj, la strebado de progresemaj, demokrataj kaj humanismaj fortoj kaj elstaruloj, grandaj laborrezultoj de kulturo, arto kaj scienco sendepende de tio el kiuj sociaj kaj klasaj ligoj ili kreskis. Sed antaŭ ĉio la urbo estas forte ligata kun la historio de la laborista klaso de Berlin kaj ĝia revolucia avangardo.

Dank' al la laborista-kamparana-potenco, dank' al la diligenta, krea laboro de siaj enloĝantoj la nomo de Berlin hodiaŭ havas bonan reputacion ĉe la popoloj, ĉe multaj homoj ĉie sur la terglobo. Hodiaŭ ĉi tiu urbo havas la honoran nomon „urbo de la paco". Engaĝiĝintaj la Berlinanoj agados por la kreo de koalicio de la racio kaj de la realismo pro la malhelpo de la danĝeroj, kiuj minacas la tutan homaron flanke de la agresivaj fortoj de la imperiismo.

[El la enkonduko de la „Tezoj de la Komitato de la Germana Demokratia Respubliko por la 750jara ekzisto de Berlin", Dietz-Verlag Berlin 1986. Tiuj tezoj ellaboritaj de laborgrupo de historiistoj, donas superrigardon pri la 750jara historio de Berlin.]

Jubilea konsultigo dum jubilea jaro

De la 12a ĝis 16a de aprilo 1987 en Budapest okazis la 20a Konsultiĝo de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj. Ĝi estis jubilea, kaj bonvene okazis en Hungario. Laŭ la iniciato de iama ĝenerala sekretario de HEA, Bela Bercerly, la serio de Konsultiĝoj ja startis en la jaro 1969 ĝuste en Hungario. 1976 okazis du konsultiĝoj (en Krakovo kaj en Moskvo), pro tio do 20 aranĝoj dum 19 jaroj (kaj ne dum 20 jaroj, kiel erare esprimas la Komuniko).

Jen la serio de la ĝisnunaj konsultiĝoj:

1. 1969 Budapest (Hungario)
2. 1970 Budapest (Hungario)
3. 1971 Berlin (GDR)
4. 1972 Smoljan (Bulgario)
5. 1973 Višegrad (Hungario)
6. 1974 Sofio (Bulgario)
7. 1975 Mělnik (ĈSSR)
8. 1976 Krakovo (Pollando)
9. 1976 Moskvo (USSR)
10. 1977 Karl-Marx-Stadt (GDR)
11. 1978 Poprad (ĈSSR)
12. 1979 Višegrad (Hungario)
13. 1980 Sofio (Bulgario)
14. 1981 Přerov (ĈSSR)
15. 1982 Jerevan (USSR)
16. 1983 Radziejowice (Pollando)
17. 1984 Bad Saarow (GDR)
18. 1985 Pisanica (Bulgario)
19. 1986 Poprad (ĈSSR)
20. 1987 Budapest (Hungario)

Do: Bulgario (4), ĈSSR-ĈEA (2), ĈSSR-SEA (2), GDR (3), Hungario (5), Pollando (2), Soveta Unio (2).

La signifo de la konsultiĝoj troviĝas aparte en la regula kaj sufiĉe intensa spertinterŝanĝo pri problemoj de multflanka kaj duflanka esperantista kunlaboro en tiu regiono de la mondo, kie la Esperpanto-movado havas aparte fortajn poziciojn. La 20a Konsultiĝo estis bonege organizita flanke de HEA. Oni akceptis komunikaĵon (vidu sube) kaj rekomendojn, kiujn la partoprenintaj asocioj (SLEAj = socialismo-landaj Esperanto asocioj) konsideru laŭ siaj eblecoj.

Jen iom la plej gravaj:

1. Ĉar 1987 ne nur estas jubilea jaro por Esperanto, sed ankaŭ jariĝas la 70an fojon la Granda Socialisma Oktobra Revolucio, la asocioj rekomendas: „La SLEAj organizu aranĝojn kaj aliajn aktivaĵojn lige kun la 70a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio".
2. Bulgara Esperantista Asocio komisiis al profesiaj sociologoj esplori laŭ sociologiaj kriterioj la konsiston de BEA. Pri la rezultoj prelegis la ĝenerala sekretario de BEA, Dimiter Papasov: „La SLEAj petas Bulgaran Esperantistan Asocion pri publikigo kaj disponigo de la sociologia esploro pri BEA".
3. Grava diskuto okazis pri la plibonigo de sciencaj esploroj pri Esperanto kaj ĝia movado, temo, kiun enkondukis d-ro Arpad Ratkai: „La SLEAj, konsciaj pri la graveco de unueco inter teoria kaj praktika agado, stimulu, kunordigadu kaj mem faru sciencajn esplorojn pri la kompleksa problemo de la internacia lingva komunikado ĝenerale kaj speciale pri Esperanto kaj ĝia movado utiligante la rekomendojn de la seminario „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado" 1986 en Bad Saarow".
4. Prof. Haszpra, vicprezidanto de HEA, ellaboris dokumenton pri la apliko de Esperanto en naturscienco kaj tekniko: „La SLEAj proponu ankaŭ al aliaj landoj utiligi la materialon „Esperanto-lingvo de la naturscienco kaj tekniko" ankaŭ por nacilingva informa agado".
5. Pri la sama temo jam ekzistas rekomendo el la jaro 1979, kiu kun amendo nun tekstas jene:
„La asocioj ĉiamaniere instigu kaj subtenu la evoluigon kaj aplikadon de E. en ĉiuj terenoj de la scienco utiligante la eblecojn, pri kiuj ŝtataj institucioj, sociaj organizaĵoj kaj industriaj-agrikulturaj-komercaj entreprenoj kaj kooperativoj disponas. La asocioj per ekstera propagando kreskigu la nombron de la esperantistaj fakuloj, precipe inter la junularo, kaj per interna propagando kaj edukado instigu la membrojn pri altnivela aplikado de la lingvo por fakaj celoj. La asocioj, pere de siaj sciencaj komisionoj, tenu kontakton unu kun alia por

reciproka plifortigo de siaj agadoj en natursciencoj kaj teknikaj terenoj. La asocioj ellaboru jarajn kaj plurjarajn planojn pri la scienca agado, precipe pri la scienca eldonado, kaj ĉiu strebu aperigi sciencan periodaĵon, kaj asocio instigu siajn membrojn kontribui al la jam ekzistantaj.
En ĉi-tiu agado la SLEAj aparte atentu la rezolucion de UNESKO 23C/11.11./1985/, la konkludarojn de la seminarioj en Bad Saarow 1982 kaj 1986 kaj la rezolucion pri faka agado de la 71a UK okazinta 1986 en Pekino."

6. Aŭskultinte prelegon pri la kooperativa movado kaj la utiligo de Esperanto en ĉi-tiu movado, flanke de d-ro József Pál, ĝenerala sekretario de HEA kaj grava funkciulo en la hungara kooperativa movado, la konsultiĝo akceptis jenan rekomendon: „La SLEAj donu apartan atenton al la utiligo de Esperanto en la kooperativa movado kaj instigu fruktodonan kunlaboron de ambaŭ movadoj. Ili sendu, se eble, reprezentantojn al la fondokonferenco de Internacia Esperanta Kooperativa Organizo."
7. Ankaŭ temis pri plibonigado de la gazetara laboro, laŭ interesa prelego de d-ro Arpad Mathe. Oni akceptis du rekomenojn.
„La SLEAj plibonigu la reciprokan riceveblon de siaj organoj, aparte utiligante la oficialajn aboneblecojn. Ili plimultigu en siaj gazetoj la reciprokan informadon pri la agado de la aliaj [i. a. per gastpaĝoj]."
„La redaktoroj de Esperanto-gazetoj de SLEAj periode kunvenu por interŝanĝi spertojn, aparte utiligante la jam tradicie okazantajn aranĝojn."
8. Kompreneble la laboro lige al UNESKO havas apartan gravecon. Pro tio oni akceptis jenan rekomendon:
„SLEAj publikigu la UNESKO-Rezolucion pri Esperanto en siaj landaj organoj kaj diversmaniere diskonigu la tekston inter esperantistaj kaj neesperantistaj rondoj. Ili kontaktu siajn landajn UNESKO-komisionojn, kunlaboru kun ili pri la plenumo de la rezolucio 23 C/11.11."
9. Jam iom da tradicio akiris aparta formo de klerigado de funkciuloj, konsideranta la specifaĵojn de la Esperanto-movadoj en la socialismaj landoj. Ĝis nun okazis en Bulgario 4 kursoj de la „Konstanta Internacia Kvalifikejo" (KIK), nome 1983, 1984, 1985 kaj 1986. Ankaŭ estonte okazos tiaj kursoj, eble ankaŭ en ČSSR (SEA), por ne nur ŝarĝi BEA. Pro tio oni akceptis jenajn rekomendojn:
„La SLEAj pozitive taksas la klerigadon de siaj funkciuloj en la Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK), kiun realigis BEA. Ili rekomendas daŭrigi ĝin."
„La SLEAj subtenas la iniciaton de SEA, krei Internacian Kleriglan Centron."
10. Ankaŭ la kulturan agadon necesas pli bone kunordigadi, por ne disipi sed pli bone eluzi la ekzistantajn eblecojn: „La SLEAj pli forte kunordigadu Esperantajn kulturajn aktivaĵojn, interŝanĝante informojn pri aranĝoj, kulturaj grupoj, artistoj ktp."
11. Dum la renkontiĝo kun la prezidanto de UEA, prof. H. Tonkin, la alta protektanto de la 72a Universala Kongreso, la prezidanto de la pola parlamento, s-ro Roman Malinovski, proponis krei en Bialystok Zamenhof-Centron: „La SLEAj subtenu la iniciaton de la prezidanto de la pola parlamento, krei en Bialystok Zamenhof-Centron."
12. Granda problemo estas la plibonigado de la aĉetado de libroj: „La SLEAj kiom eble plej rapide sin reciproke informu pri aĉeteblaj aŭ interŝanĝeblaj libroj, uzante aparte la oficialajn libromerkatajn kanalojn. La SLEAj prezentu al ĉiu konsultiĝo konkretajn ofertojn."
13. Pli kaj pli efikaj fariĝas korespondaj kursoj. Necesas kunlaboro pli bona: „La SLEAj interŝanĝu materialojn pri korespondaj kursoj kaj organizu komunajn internaciajn renkontiĝojn de partoprenintoj kaj lektoroj de tiuj kursoj." D. B.

Komuniko

Inter la 12-16-a de aprilo 1987 en Budapeŝto, Hungario, okazis la 20-a Konsultiĝo de la Reprezentantoj de la Esperanto-Oranizaĵoj el la Socialismaj Landoj.
Ĝin partoprenis delegitaroj de la Esperanto-Asocioj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando kaj Sovetio. La partoprenintoj substrekis, ke ĉi tiu kunveno okazas en la jaro de centjariĝo de Esperanto, kiu instigas la esperantistojn labori pli energie por disvastigi la internacian lingvon Esperanto serve al la paco, progreso kaj interkompreniĝo de popoloj.
Samtempe la Konsultiĝo estas jubilea kunordiga renkontiĝo de la reprezentantoj de la Esperanto-Asocioj el la socialismaj landoj, kiuj dum pasintaj 20 jaroj [1]) donis gravajn pozitivajn rezultojn.
La ĉeestantoj pridiskutis la rolon de Esperanto en la nuna epoko de la scienc-teknika revolucio, socia progreso kaj evoluo. Ili konstatis, ke ekzistas grandaj ebloj pere de Esperanto kontribui al la progresigo, disvastigo kaj utiligo de la sciencoj kaj tekniko.
Estis pritraktata la laboro de la Esperanto-Asocioj de la socialismaj landoj, kiu ankaŭ en la estonto devos daŭri konkorde kun la rezolucioj de UNESKO pri Esperanto.
La partoprenantoj esprimas sian dankon al HEA pro la certigo de bonaj laborkondiĉoj.
Budapeŝto, la 16-an de aprilo 1987.

[Fakte eraro: temas pri 19jaroj. Vidu la apartan artikolon. La red.]

La Ĝenerala Sekretario de MEM en GDR

Clement Tholet el Belgio, la Ĝenerala Sekretario de Mondpaca Esperanta Movado, restadis en nia lando inter la 10-a ĝis 18-a de marto 1987. Li partoprenis IFER '87 kaj antaŭ kaj post ĉi-tiu aranĝo vizitis Berlin, kie li havis kontaktojn kun la lokaj esperantistoj. La 11-an de marto Clement Tholet prelegis pri la belga pacmovado kaj pri MEM antaŭ esperantistoj de Berlin.
En „BZ am Abend" de 13. 3. 87 aperis sur unua paĝo mallonga intervjuo kun la gasto.

La IVa Centra Konferenco

La tuta Kulturligo de GDR elektis novajn estrarojn, sur ĉiuj ebenoj, en ĉiuj fakoj. Ankaŭ la esperantistoj, organizitaj en Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (=GDREA) elektis. Post kiam la grupoj, subdistriktaj kaj distriktaj estraroj estis elektintaj siajn estrarojn, la delegitoj, kiuj ricevis la mandatojn de la distriktaj elekto-konferencoj, devis decidi pri la nova Centra Estraro de GDREA.

La IVa Centra Delegita Konferenco do okazis de la 3a ĝis 5a de aprilo '87 en la jam tradiciriĉa esperantista urbo (por ne diri metropolo, ĉar tiam sendube — espereble — protestos aliaj distriktoj). De 189 mandathavaj delegitoj el ĉiuj 15 distriktoj de GDR partoprenis 181, t. e. 95,8 % Bona ĉeesto.
La konferenco okazis en la IFER-konstruaĵo, la porjunulara klubdomo „Interpopola amikeco" en Leipzig-Grünau.
Kiel gastoj partoprenis la konferencon la membro de la Prezidio de KL, **d-ro Gerhard Mertink,** la membro de la Sekretariato de KL, **Gerhard Brähmer,** la membro de la Prezidia Konsilantaro kaj Prezidanto de la Distrikta Estraro Leipzig de KL, **prof. d-ro sc. Peter Held,** la 1a sekretario de la Distrikta Estraro de KL Lepizig, **d-ro Rudolf Fiedler** kaj **d-ro Klaus Venor,** reprezentanto de la Distrikta Estraro Leipzig de Socialisma Unuiĝinta Partio. Post la muzika enkonduko de violina-piana kvinteto sub

gvido de la [esperantlingva] komponisto **Dankward Pfeiffer** sekvis salutparoladoj de **prof. Held** kaj de eksterlandaj gastoj. Ĉeestis de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) **Donĉo Hitrov,** membro de la buroo de BEA kaj **Evgenij Georgiev,** membro de la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo. Ĉeĥan Esperanto-Asocion reprezentis **Margit Turkova,** reprezentantino de la Ĉeĥa MEM-sekcio kaj redaktorino de la ĉeĥa Paco-eldono. Flanke de Slovakia Esperanto-Asocio partoprenis ties vicprezidanto, **d-ro Elemir Erby, d-rino Maria Grigušova** kaj **Anton Zaĥarias,** membroj de la Centra Komitato de SEA, Polan Esperanto-Asocion reprezentis ties vicprezidanto **Antoni Golonka.** Kaj el Hungario ĉeestis **Zsolt Gyarmatyj,** membro de la Ĉefa Estraro. Bedaŭrinde, dum la jubilea jaro de la ruĝa oktobro, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj ne sendis oficialan reprezentanton, malgraŭ tre frua kaj kelkfoja invito. Tamen, feliĉe partoprenis la sovetia esperantisto **d-ro Andronov,** astronomo, laboranta portempe en Jena.

La delegitoj omaĝis al la forpasintaj membroj de la Centra Estraro de GDREA, kiu unuan fojon elektiĝis en la jaro 1981 en Karl-Marx-Stadt. Forlasis nin **Otto Bäßler, d-ro Hans-Joachim Hußner, Walter Röhner, Hella Sauerbrey, Ernst Schonert** kaj **d-ro Karl Schulze.**

En ampleksa priagada raporto la prezidanto de GDREA, **Hans Heinel,** resumis la atingojn kaj mankojn de la 6-jara periodo post la fondo de GDREA. Dum la sekva diskuto **d-ro Gerhard Mertink** transdonis la salutojn de la prezidanto de Kulturligo, **prof. d-ro Hans Pischner** kaj tre alte aprezis la agadon de la malgranda sed tre aktiva asocio. 9 alparoloj grave rondigis kaj pliprofundigis la bildon pri la farita agado kaj pri la problemoj estonte solvendaj. **Hans-Jürg Kelpin,** prezidanto de la MEM-Komisiono kaj de la Distrikta Estraro Erfurt, substrekis la kontribuon de la esperantistoj en la porpaca agado, kontribuo, kiu nepre devas fariĝi ankoraŭ pli konkreta kaj pli sentebla.

Kurt Güse, la prezidanto de la Distrikta Estraro Schwerin substrekis la bonajn rilatojn al sovetiaj esperantistoj, aparte al la Estona Soveta Respubliko. Tre interesan bildon pri multflanka kulturligeca laboro en la subdistrikta urbo Stralsund pentris **Hans-Joachim Borgwardt.** La serio de la IFER-aranĝoj estas esprimo de rigora klopodo je pli altkvalita esperantista agado, sukcesa klopodo, kiel montris **Sabine Schulze,** prezidantino de la Distrikta Estraro Leipzig. Ke la Junulara Komisiono ĉe GDREA ne nur havas planon sed jam sufiĉe konkrete agadas, prezentis ties prezidanto **Detlef Kraus.** Post la junulo parolis la filino de la fondinto de Germana Laborista Esperanto-Asocio, **Ino Kolbe** el Leipzig. Ŝi montris kiom necesas sed ankaŭ malfacilas serĉi, trovi, konservi kaj prilabori materialojn pri la historio de GLEA. **Michael Behr,** la gvidanto de la Komputista Fakgrupo ankoraŭfoje substrekis la neceson de scienc-teknika apliko de Esperanto, montrante kelkajn agaddirektojn. Kaj la profesia lingvisto, **d-ro Ronald Lötzsch,** kunlaboranto de la Centra Instituto de Lingvistiko ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR, okupiĝis en sia kontribuo i. a. pri antaŭjuĝoj de kelkaj lingvistoj sed ankaŭ pri gravaj, ŝanĝoj en lingvistikoj rondoj de GDR rilate al Esperanto. Kiom ni devus plibonigi nian agadon en la gazetaro kaj aliaj amasmedioj prilumis **Joachim Schulze,** la redaktoro de „Saksa Kuriero".

Sabate posttagmeze la diskuton sekvis distingoj kaj elektoj.

La kompletan nove elektitan Centran Estraron de GDREA ni prezentos per fotoj en unu el la sekvaj numeroj.

Ni nur menciu la konsiston de la prezidio:

prezidanto: **Hans Heinel**
vicprezidantoj: **Rudolf Hahlbohm, Manfred Arnold**
sekretario: **d-ro sc. Detlev Blanke**
aliaj membroj:
Linde Knöschke, Detlef Kraus, Siegfried Linke, Werner Pfennig, kaj Joachim Schulze

La malnovan Centran Estraron forlasis 7 iamaj membroj. Eniris 9 novaj, inter ili 3 junuloj. Kune kun la 13 distriktaj prezidantoj la tuta Centra Estraro nun havas 49 personojn.

Okaze de la 80-a naskiĝtago de Rudi Graetz

Unu el niaj pioniroj

Ne malmultaj ankoraŭ memoras Rudi Graetz, la unuan gvidinton de la novnaskiĝinta Esperanto-movado en GDR.

Naskiĝinta en la jaro 1907 (24. junio) Rudi plenkreskis en la norda regiono de Germanio, en Rostock. Tie dum la dudekaj jaroj li lernis Esepranton kaj aktivis en la Germana Laborista Esperanto-Asocio (LEA). Apenaŭ 23jara li fariĝis la gvidanto de la Distrikto Mecklenburg. La influo de sovetiaj esperantistoj helpis lin trovi la vojon de la socialdemokratia partio al la komunista partio de Germanio. Pro lia konvinko li devis iri en la prizonon. Post la tempo de la faŝismo, kiam 1945 ekestis nova ŝanco por la germana popolo, Rudi Graetz tuj aktive kunlaboris por nova Germanio. Post diversaj aktivadoj li eklaboris en la eksterlanda komerco kaj grave helpis konstrui internaciajn komercajn rilatojn de GDR al eksterlando. Li estis la gvidinto de la komercaj reprezentejoj en Rejkjavik (Islando) kaj Kopenhago (Danlando).

Kiam 1965 estis reorganizita la Esperanto-movado en Kulturligo de GDR, Rudi Graetz fariĝis la prezidanto de la iama Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. Li havis grandan personan meriton rilate diversajn komponentojn de la nova agado, kreo de organiza strukturo, trovo de taŭgaj kadruloj, ekligo de unuaj internaciaj

1974 Rudi Graetz transdonis la flagon de la iama laborista Esperanta grupo en Rostock al la siatempa Distrikta Laborrondo Rostock

---

Dum la distriktaj delegitaj konferencoj elektiĝis kiel prezidantoj:

Berlin: **Manfred Arnold**
Cottbus: **Christel Kraus**
Dresden: **Dr. sc. Günter Minkwitz**
Erfurt: **Hans-Jürg Kelpin**
Frankfurt/O.: **Ronald Schindler**
Halle: **Hans-Peter Bartos**
Karl-Marx-Stadt: **Rudolf Burmeister**
Leipzig: **Sabine Schulze**
Neubrandenburg: **Werner Pfennig**
Potsdam: **Rosen Trenner**
Rostock: **Paul Linke**
Schwerin: **Kurt Güse**
Suhl: **Dr. Hans Rogazewski**

Pro personaj kialoj kaj pro malebleco vere aktivi en la centra gvidantaro ne rekandidatiĝis: **prof. d-ro Georg Friedrich Meier, d-ro Martin Schüler, Marita Dörner, Renate Levin, Jürgen Hamann, prof. d-ro Viktor Falkenhahn kaj Hans Wegener.** Al ili dankon pro la laboro farita dum la pasinteco.

La konferenco finiĝis per balo. Tamen, dimanĉe oni aŭskultis prelegojn kaj povis partopreni fakgrupojn. Prelegis: **Michael Behr** „DLT", **d-ro Detlev Blanke** „Evoluo de Esperanto", **Anton Zaĥarias** „Intensivaj metodoj de Esperanto-lernado.". Post la prelegoj laboris jenaj fakgrupoj: „Sciencteknika apliko de Esperanto" **(Michael Behr),** „Intensivigado de Esperanto-instruado" **(Achim Zettier),** „Informado pri Esperanto en la publiko kaj amasmedioj" **(Joachim Schulze),** „Interlingvistiko/esperantologio" **(Detlev Blanke).**

Jen, superrigardo pri la IVa. Tre laborriĉa, kun novaj impulsoj por la laboro. Ni iru al nova etapo! P. L.

rilatoj al Esperanto-asocioj en socialismaj landoj kaj al la internaciaj Esperanto-organizaĵoj, aliĝo al Universala Esperanto-Asocio 1976, agado dum Universalaj Kongresoj, eldonado de esperantlingvaj materialoj pri GDR, profiligo de „der esperantist" k. a.
Rudi Graetz estis trankvila homo, personeco karakterizita per persistemo kaj toleremo. Tio al li kreis multajn amikojn enlande kaj eksterlande.
Kiel membro de la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo Rudi Graetz digne kaj efike reprezentis la esperantistojn en la granda socialisma kulturorganizajo de GDR. 1977 li partoprenis la 9an kongreson de Kulturligo en Berlin, sidante en la prezidio. Bedaŭrinde nemulte da tempo post la kongreso, la 1an de oktobro 1977, li forpasis. Do la jaro 1987 ankaŭ estas la 10a datreveno de la morto de Rudi Graetz, ne nur la jaro de lia 80a naskiĝtago. Ĉi tiuj datoj estu por ni okazo de rememoro pri unu el niaj plej gravaj pioniroj kaj internaciistoj.

Bibliografio de la plej gravaj publicaĵoj de Rudi Graetz:

(1932): Esperanto und die Entwicklung der proletarischen Kulturbewegung. En: Weltkontakt, Sondernummer des „Arbeiter-Esperantist", **18,** Herbst 1932, p. 1 — 2
(1930): Gründet Esperantozirkel! En: Arbeiter-Esperantist, Berlin, **16,** n-ro 9, p. 1
(1931a:) Die Dorfkorrespondenz. En: Arbeiter-Esperantist, Berlin, **17,** n-ro 2, p. 1 — 2
1931b): Paneuropa als Gefahr für die europäische Arbeiterschaft. En: Arbeiter-Esperantist, Berlin, **17,** n-ro 5, p. 3
(1965a): Mit dieser ersten Ausgabe. En: de, **1,** n-ro 1/2 (sept./okt.), p. 1 — 2
(1965b): Echo. En: de, **1,** n-ro (1/2 (sept./okt.), p. 32
(1965c): Esperanto-Klubabende im Ausland. En: de, **1,** n-ro 3/4 (nov.-dec.), p. 31
(1966a): Gut vorbereitet zum Weltkongreß. En: de, **2,** n-ro 5/6 (aprilo/majo), p. 32
(1966b): Brief aus Damaskus. En: de, **2,** n-ro 9/10 (dec.), p. 15
(1967a): Einige Anregungen und Wünsche. En: de, **3,** n-ro 11/12 (marto/aprilo), p. 21 — 22
(1967b): Allgemeine Entwicklungstendenzen der sozialistischen Kultur. En: de, **3,** n-ro 13 (junio), p. 15 — 16
(1967c): Der Einfluß der Großen Sozialistischen Oktoberrevolution auf deutsche Arbeiter-Esperantisten. La influo de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio al germanaj laboristoj-esperantistoj. En: de, **3,** n-ro 16/17 (nov./dec.), p. 9 — 11
1968a): La guŝta sinteno de Esperantisto: En: de, **4,** n-ro 20/21 (aprilo), p. 6
(1968b): El parolado de nia prezidanto Rudi Graetz, farita antaŭ kursgvidantoj en Berlino. En: de, **4,** n-ro 22/23 (junio), p. 14 — 15
(1968c): Termino: En: de, **4,** n-ro 24 (aŭgusto), p. 11
(1968d): Esperanto im Dienste unserer Republik. En: Mitteilungsblatt des Deutschen Kulturbundes, Berlin, n-ro 5, p. 10 — 11
(1968e): Esperanto devas servi al la paco. En: Paco, Berlin, **11,** n-ro 175/176, (junio-julio, GDR-numero), p. 25 — 26
(1969a): La kontribuo de la esperantistoj por la fortigo de GDR. En: de, **5,** n-ro 30/31 (majo-junio), p. 7 — 9, n-ro 32/33 (julio-aŭgusto), p. 24 — 25
(1969b): Esperanto — Vorträge über die DDR in Polen. En: de, **6,** n-ro 38/39 (januaro-februaro), p. 12 — 13
(1969c): Rec. al: Juhan Smuul, „Ŝippereo", Moskvo 1968. En: Paco, Berlin, **11,** 187—188, junio-julio, (GDR-numero), p. 37
(1969d): Impresoj en arabaj landoj. (Kiel gvidanto de delegacioj al foiroj kaj esperantisto.) En: Paco, Berlin, **11,** 187/188, junio-julio (GDR-numero), p. 30 — 32
(1970a): Malgraŭ israelaj agresoj — ekonomiaj sukcesoj en la arabaj landoj. En: Paco, Berlin, 7 — 8 (GDR-numero), p. 8 — 9
(1970b): Esperanto-amikoj de GDR por la paco. Kvin jaroj da sukcesa laboro. En: Paco, Berlin, 7 — 8 (GDR-numero), p. 34 — 35
(1971a): La proksimorienta problemo — historie. En: Paco, Berlin, n-ro 4, (GDR-numero), p. 16 — 17
(1971b): Pri ideologiaj konceptoj de L. L. Zamenhof. En: Paco, Berlin (GDR-

numero), n-ro 4, p. 35 — 37
(1971c): Tradicioj. En: de, **7,** n-ro 46 (marto-aprilo), p. 5—8, n-ro 47 (majo-junio), p. 2 — 4
(1972a): Begegnungen in der Mongolei. En: de, **8,** n-ro 51 (jan.-febr.), p. 1 — 3
(1972b): 50 jaroj USSR. En: de, **8,** n-ro 55—56 (nov.-dec.), p. 1 — 2
(1972c): Hauptreferat auf der Zentralen Konferenz der Esperantisten der DDR am 27./28. Mai 1972 in Berlin. En: de, **8,** n-ro 55-56 (nov.-dec.), p. 4 — 13
(1972d): Renkontiĝo en Mongola Popola Respubliko. En: Paco, Berlin, n-ro 4 (GDR-numero), p. 26 — 27
(1972e): La Suez-kanalo kaj la paco. En: Paco, Berlin, n-ro 4, (GDR-numero), p. 8 — 9
(1973a): Impresoj de la VIIIa Kongreso de Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko. En: de, **9,** n-ro 57/58 (jan.-majo), p. 2 — 4
(1973b): Pri historio de tradukita libro. En: de, **9,** n-ro 57/58 (jan.-majo), p. 10 — 11
(1973c): Urlaub an der Ostsee. En: de, **9,** n-ro 59/60 (junio-okt.), p. 36
(1973d): La konstruo de akvobaraĵoj en arabaj landoj. En: Paco, n-ro 4 (GDR-numero), p. 22
(1973e): Dudek jaroj MEM kaj la esperantistoj de GDR. En: Paco n-ro 4 (GDR-numero), p. 5 — 6
(1974a): Solidarecon, speciale nun. En: de, **10,** n-ro 63/64 (1/2), p. 6
(1974b): Rostock ĉe la pinto. En: de, **10,** n-ro 63/64 (1/2), p. 38—39
(1974c): Ne staru flanke! En: de, **10,** n-ro 65/66 (3/4), p. 7 — 11
(1974d): Aus der Arbeit unseres polnischen Bruderverbandes. En: de, **10,** n-ro 65/66 (3/4), p. 30 — 32
(1974e): 25 jaroj Germana Demokratia Respubliko kaj la laboro de la Esperantistoj. En: Paco, Berlin, (GDR-numero), p. 19 — 20
(1974f): Problemoj de paca solvo en Proksima Oriento. En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 10 — 11
(1975a): La 30jara datreveno de liberigo de la faŝismo kaj la Baltmaraj landoj. En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 7 — 8
(1975b): Kelkaj pensoj pri la 60a Universala Kongreso. En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 35
(1975c): La disvolvo de Esperanto en GDR. En: Pola Esperantisto, Warszawa, n-ro 3 — 4. aŭgusto, p. 8 — 10
(1976a): Konsideroj pri ekonomia vortaro. En: de, **12,** n-ro 78 (4), p. 12 — 15
(1976b): Paco en Libanono? En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 13
(1976c): Kutimoj kaj moroj. En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 12
(1977a): Paco, malstreĉiĝo, malarmado. Memoroj pri la IXa Konsultiĝo. En: Paco, Berlin (GDR-numero), p. 9 — 10
(1977b): La estontaj taskoj de la esperantistoj en Kulturligo de GDR. En: de, **13,** n-ro 82 (2), p. 1 — 6
Pri Rudi Graetz aperis materialoj en GDR-eldono de „Paco" 1977, p. 31, GDR-eldono de „Paco" 1978, p. 35, „der esperantist" n-ro 54 (aŭg.-okt. 1972), p. 12, n-ro 83 (3/1977), p. 13 kaj n-ro 86 (6/1977), p. 3 — 4.
de = der esperantist, Berlin: Kulturbund

Detlev Blanke

Letero el Afriko

Nia redakcio ricevis interesan leteron el Afriko pri esperantista agado, kiun ni publikigas, por doni al la legantoj iom da imago pri la malfacila enpenetro de Esperanto en afrikajn landojn kaj samtempe pri mirinda entuziasmo, kiu havigas al la lingvo amikojn ankaŭ sur ĉi-tiu kontiento. Ni ne ŝanĝis la lingvostilon:

Esperantieto en Afriko

Anyron-Kope (aniron kope) estas vilaĝo situanta en la sudo de Togolando, en la departemento VO. Ĝi estas unu el la plej konataj vilaĝoj en Togolando pro

— sia ido Dosseh-Anyron Robert Casimir, ĉefepiskopo de Togolando
— sia potenca Fetiĉo Hevieso, kiu draste punas ŝtelistojn, rabistojn, murdistojn k. t. p. (el kiu ajn parto de la mondo), kies farojn oni antaŭe diras al ĝi.

Ĝi estas ankaŭ unu el Togolandaj vilaĝoj, kiuj havas kaj elementan lerne-

jon kaj duagradan [mezgradan] lernejon. Lernado tie bone fartas, eĉ junuloj el najbaraj vilaĝoj venas tien por studi. Tiu disponebleco de la vilaĝo akcepti lernantojn por mezgrada lernado igas, ke ĉiuj ĝiaj junuloj en ĝi vivas.

La junularo havas difinitan agadkampon:

— Gardi ĉiam puraj la areojn kaj ĉirkaŭaĵojn de la vilaĝo.
— Partopreni al la starigo kaj al la persistigo de trankvilo en la vilaĝo, k. t. p.

Futballudo estas la kunigilo de la junuloj. Ĉiuvespere ili ariĝas ĉe la stadiono de la vilaĝo por trejni kaj kelkafoje ankaŭ por trakti problemojn, kiujn iu(j) elvokas.

La plejmulto de la junuloj estas katolikoj. Ĉi-tiuj kunsidas tre ofte por religiaj aferoj. Inter ĉi tiuj junaj katolikoj de la vilaĝo estas kompatindulo orfa, unusole naskita, sensubtena, sed sindonema kaj ĝentila s-ro Kossi Logossou (Firmin) (Kosi Logosu), dank' al kiu Esperanto radikiĝas en Anyron-Kope. Kiel do ĉio ĉi okazas?

Estis dum oktobro 1985a, kiam mi devis sendi leteron kune kun la tri unuaj lecionoj de Esperanto (kurso Ferez) al ekssamklasano s-ro Kossi Logossou, kiu pro kortuŝigaj kaj kompatigaj problemoj vivas en la vilaĝo. Mi devis korekti mem liajn taskojn, sed mi estas ege malproksime de li, mi vivas en Lome kaj li en Anyron-Kope, kiu situas ja ĉirkaŭ 60 km for de Lome. Mia korektado ege favorigus la malrapidecon de lia lernado. Tial mi petis de li, ke li kontaktu mian kunlaboranton Attiogbe-Agbemadon, loĝantan en vilaĝo proksime de Anyron-Kope.

Kiel memorinda tago! S-ro Kossi senprokraste retrovis s-ron Agbmadon, al kiu li montris kaj mian leteron kaj la tri unuajn taskojn. Kia ĝojo por ambaŭ samlandanoj! Unu ĝojis, ĉar li retrovis iun tre sindoneman, akceptemman kaj homanan, ankaŭ la alia, ĉar li akceptis iun talentan kaj lertan, eblan Pioniron de Esperanto-movado en Togolando. Post longtempa interparolado s-ro Kossi devis trapasi la riveron Zowloa per pirogo por rehejmeniĝi kune kun du pliaj lecionoj kaj traktotaj taskoj.

Tiel, iom post iom, s-ro Kossi tute esperantiĝis. Oftajn leterojn li skribis al mi por informi min pri la situacio. Mi ege miris pro lia lingvaĵo, li multe laboris. Per persistemo kaj volo, li finis la kurson. Li fariĝis bona esperantisto kaj ankaŭ vera malperfidemulo. Mi diras, ke li estas malperfidema, ĉar scias kiam oni parolu. Mi diras al li je la komenco de lia studado: „Nenion diru al iu pri tiu studado, se ne, oni malkuraĝigos vin. Klopodu fini la tutan kurson kaj poste vi ĉion malkaŝos." S-ro Kossi observis tion, kaj tuj post kiam li finis la kurson, li skribis al mi por la instruado de E-o en la vilaĝo. Certe, tiuj, al kiuj li montris la legaĵojn pri esperanto kaj leterojn enhavantajn fotojn kaj bildkartojn, interesiĝis.

En mia respondo al li mi petis de li, ke li rekontaktu s-ron Agbemadon por ankaŭ tiu afero. Neniu problemo kuŝis tie, s-ro Agbemadon donis al li la lecionojn antaŭ ol kontakti min. Ankaŭ mi donis al li kelkojn lecionojn, iam, kiam li vizitis min en Lome. Provizante sin per tiuj lecionoj, s-ro Kossi Logossou senlace esperantistigas.

Lia unua lernanto estas Doumegnon Koffi, lernanto en la unuaklaso de la mezgrada lernejo. Li profitis de sia litertempo por esperantistiĝi. Aliaj samvilaĝanoj sekvis:

— Agblo Kossi
— Kongo Kodjo
— Dravie Etsri
— Messan Folly (Gabriel)
— Adjogbovie Ekkou k. a.

Ĉiuj estas lernantoj en la mezgrada lernejo. La libertempo permesis al ili esperantistiĝi. Krome tiuj lernantoj, aliaj junuloj pliaĝaj vivantaj en la vilaĝo, nome Agbolo Edo, Creppy Foli k. t. p. interesiĝas pri la lingvo. Nur s-ro Kossi Logossou gvidas ilin. Kiu en la vilaĝo ne scias ion pri Esperanto? Preskaŭ ĉiuj lernantoj kaj instruitoj en la vilaĝoj scias, ke Esperanto estas lingvo internacia. Eĉ analfabetuloj interesiĝas pri tio.

Iam, kiam mi vizitis la vilaĝon, du tieaj analfabetuloj demandis min pri la lingvo. Ili petis, de mi, ke mi havigu al ili lernolibrojn por alfabetigo (alfabetumojn), kiuj permesu al ili esperantiĝi.

Kiel anoj de vilaĝo en Afriko povas tiamaniere sukcesi scii ion pri Esperanto, dum multaj homoj en urboj afrikaj, eĉ eksterafrikaj, ne scias ion pri tiu lingvo? Mirinde! Ĉu tiu vilaĝo ne rajtas nomiĝi Esperantieto?

P. S.: Esperantistoj tutmondaj klopodu helpi al tiuj junaj vilaĝanoj profunde praktiki la lingvon. Tiuokaze ili povas sendi libretojn kaj revuojn (mal)novajn al ili.

Oni rememoru, ke tiu vilaĝo estas konata ankaŭ pro siaj potencaj fetiĉoj. Certe vidindaĵoj tie staras.

Por informoj pri la mirindaĵoj de la vilaĝo kaj por la sendo de legindaĵoj bonvolu kontakti:

— Kossi Logossou, s/c Soeur Odile, B. P. 28 Aneho, Togo
— Gbeglo Koffi, B. P. 13169 Nyekonapcè, Lome, Togo.

El intervjuo de „Hungara Vivo" (HV) kun la redaktoro de „Juna Amiko" Stefan Mac Gill:

Pli ofte, pli regule, pli trafe

La lernejana revuo Juna Amiko lastatempe anoncis sian kontribuon al la Jubilea Jaro. Ĝi estonte aperos kvarfoje jare anstataŭ tri-foje. Ĉar ankaŭ lastatempe nova redaktoro ekoficis, HV starigis al li kelkajn demandojn. **La unua temis pri la rolo de Juna Amiko.**

Ĝi devus ludi centran rolon en la eduka programo de la tuta Movado. UEA proklamis la intensigon de instruado prioritata inter siaj jubileaj celoj, kaj iniciatis pli intiman kunlaboron kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Fakte, ILEI transprenas de UEA ĝian agadon efektivigi la laboron sur tiu kampo. Ne estas sekreto, ke ILEI estas aparte forte reprezentata en Hungario. La Komitato de UEA en Pekino akceptis rezolucion kiu substrekis la gravan rolon de Juna Amiko kaj tiun takson agnoskas ankaŭ ILEI. Sekve, Juna Amiko estas ne nur propra aŭ komerca projekto de HEA; ĝia rolo estas nepre internacia. HEA estas laŭmembre kaj multrilate laŭ administraj rimedoj inter la plej fortaj landaj asocioj de UEA; tial ĝi havas moralan respondecon kontribui aktive al la internacia laboro de la tuta movado. Mi volus loki Junan Amikon centre en tiu respondeco, same kiel jam estas tie lokita la misio aktive eldonadi librojn. Hungario estas en unika pozicio pro tio, ke ĝi kapablas priservi kaj la socialisman kaj la kapitalisman mondojn.

Vi lokas Junan Amikon centre en la edukaj programoj de la Movado. Bonvolu skizi koncize vian koncepton de tiu programo.

La prioritataj kampoj estas laŭ mi jenaj:

— Kampanji por akiri permesojn instrui Esperanton oficiale en almenaŭ iuj niveloj de la eduka sistemo sub adekvataj kondiĉoj en tiuj landoj kie ministeriaj permesoj estas ankoraŭ ne akiritaj aŭ bezonataj.
— Prizorgi la trejnadon de sufiĉaj instruistoj por ekspluati la teoriajn permesojn instrui. Ni instruu Esperanton al lingvo-instruistoj konvinkitaj ekokupiĝi pri ĝi, kaj lingvodidaktikon al esperantistoj dezirantaj instrui. La trejnado ĝuu la subtenon de la edukaj instancoj, en ekz. livero de ejoj kaj iloj por intensaj kursoj kaj oficiala diskonigo pri kursoj en instruistaj fak-gazetoj. Disponigo de faciligoj trejni instruistojn estu inkluzivita en la petoj poroficialigo de Esperanto-instruado. Unu sen la alia estas preskaŭ senutila, kaj la grado ĝis kiu instancoj pretas subteni la instruistan trejnadon estas honesta mezurilo de lia seriozeco permesi la instruadon entute. Finfine, ĉiu alia lingvo instruata en lernejoj ĝuas ligitan programon de instruista trejnado.
— Liveri adekvatajn apogajn materialojn, helpilojn kaj konsilojn, kaj didaktikajn kaj pri la internaciaj kulturo kaj Movado ligitaj al la lingvo.
— Kompiladi ĝisdatan kaj fidindan registron pri la ampleksoj kaj kondiĉoj de instruado en la diversaj landoj, kiu formu parton de la bazo por perspektiva kaj precipe internacia planado.
— Kontinue klopodi krei respondojn al la demandoj de lernantoj „Kial mi entute lernu la lingvon" kaj „Kiel mi povos utiligi la lingvon,

fine de mia kurso".
La plej akutaj el la supraj punktoj estas laŭ mia juĝo la dua kaj la lasta. Kvankam Juna Amiko plej evidente apartenas al la tria punkto, ĝi povas ludi utilan rolon en la plenumo de tiuj du plej gravaj punktoj.

Bone, jen la kadro por la revuo, kion pri la enhavo de Juna Amiko?

Unue, ni celas vere internacian etoson, stilon kaj enhavon. Ĝi estu leginda kaj uzebla en ĉiu mondparto. La plimulto de niaj legantoj nuntempe troviĝas en socialismaj landoj — sekve ankaŭ la plimulto de la kontribuantoj. Sed mi mem kontribuas en ne-modestaj kvantoj al la revuo, kaj kvankam mi klopodas esti maksimume internacia, neeviteble miaj eroj spegulas britnovzelandecan aŭ okcidentan aliron al lingvo-instruado. Tio portos iom da ekvilibro, kiun suplementos la kresko de okcidentaj kontribuantoj, kiu sekvos la iom-post-ioman rekreon de la abonantaro en okcidentaj landoj. Post la financa fortigo rezulte de tio, HEA kuraĝos proponi la revuon al evoluantaj Esperanto-Movadoj en Azio, Afriko kaj Latin-ameriko je pli favoraj kondiĉoj, tiel ke ankaŭ de tie ekfluos kontribuaĵoj.

Vi skizis la devenon de la artikoloj, sed pri la enhavo mem . . .?

Ni konservos la konatan varion — artikoloj, rakontoj, enigmoj, leteroj de legantoj, kantoj kun muzik-notoj poemoj — fakte kontribuaĵoj ne mankas, ili alvenas regule. La artikoloj nur malofte estos pri Esperanto mem, tiuj kiuj ja aperos, koncentriĝos pri praktikaj manieroj utiligi la lingvon, ekz. pri kongresoj, Pasporta Servo, korespondado ks. Ni volas direkti la emfazon iom for de fabeloj kaj historiaĵoj kaj pli emfazi la uzon de la lingvo en praktika moderna komunikado. Iuj rakontoj precipe tiuj de mia propra plumo, estos pli didaktike strukturitaj; kvankam la legantoj ne nepre rimarkos tion, la instruisto scios trafe ekspluati tion. En tiuj rakontoj, sprito kaj humuro ludos centran rolon. Ni aperigos regule skeĉojn aŭ teatraĵetojn en simpla lingvaĵo, por maksimume stimuli konversacion kaj paroladon. Ni aldonos instrukciojn per kiu grupo kaj instruisto povos mem starigi sen-tekstan liberan dialogadon. Tiu uzo de rol-ludado estas nuntempe vaste kaj sukcese uzata en naci-lingva instruado. En Budapeŝto mi mem plektiĝas en la kreskanta instruado de la angla lingvo — lingvo gramatike koŝmara, idiotisme labirinta, ortografie perversa kaj prononce harelŝiriga. Tamen, mi ne povas eviti konfesi, ke oni multkaze ĝin sukcesas instrui same efike kaj rapide kiel ni Esperanton. Konsentite, motivigo ludas ŝlosilan rolon tiurilate, sed ni devus esti pretaj mem uzi la konversaciigajn, rol-ludajn, strukturgramatikajn metodojn, kiuj portas al ili tian sukceson. Ni esperas en Juna Amiko prezenti iom el tiuj metodoj, adaptitaj al la unikaj avantaĝoj, kiujn la logikeco kaj simpleco de Esperanto proponas.
En Juna Amiko mem ne eblas aldoni pli ol la plej koncizajn didaktikajn klarigojn, sekve aperos en la revuo de ILEI Internacia Pedagogia Revuo du artikoloj (en numeroj 2 kaj 3 de jarkolekto 1987), unu kiu klarigas kiel uzi verkitajn skeĉojn por sproni spontanan konversaciadon, kaj unu kiu klarigas kiel tion ekigi per rol-ludado. La artikoloj uzas kiel ekzemplojn skeĉojn jam aperintajn en Juna Amiko; tio ja substrekas la kunlaboron kaj reciprokan subtenon inter JA kaj ILEI.

Ekde 1987 la revuo aperos kvarfoje jare; laŭ kiu ritmo?

La unua numero sub mia redakto, numero 86/3 aperis en novembro 1986. Numero 87/1 kun ĉefartikolo „Jubileo pro junulo" transiris al la presejo — iel simbole — en la Zamenhofa tago (Dec. 15) kaj aperis februare; 87/2 estas finplanita, en Prago nia desegnisto diligente plumumas, ĉio estos fru-februare transdonita, cele al aprila distribuo. Poste sekvos paŭzo ĝis septembro pro la lernejaj ferioj en la plimulto de konsumlandoj. La numeron 87/3 ni pretigos ĝis julio, lasante kvinon da paĝoj por raportoj de la jubileaj kongresoj. La kvara numero aperos en novembro. Tiel aspektos la jara ritmo.

Juna Amiko estas revuo kun longa sed varia historio; jam ĝi havis eldonkvanton de 5 000. Kiel ĝi nun statas, kaj kiel vi kaj HEA planas bonigi ĝian estontecon?

Efektive, ĝi estas nun presata en nur 2 800 ekzempleroj, el kiuj ŝajne malpli ol 2 000 estas fakte abonataj. La revuo estas deficita — dum ĝi devus esti bela enspezigilo. En la lastaj jaroj la abonantaro en okcidentaj landoj iĝis praktike nula pro malregula aperado kaj ekspedaj misoj. Necesas rekrei fidon pri la akurateco kaj liverado, samtempe kun enhavaj modifetoj kaj pliigita ofteco. Gazeto por junaj lernantoj devas esti regula amiko kaj akompananto en la lernado — el multaj landoj instruistoj kaj infanoj pledis por pli ofta aperado.

Sed pli ofta aperado ne solvas ĉiun problemon. Kion pri la reguleco?

La gazeto suferis laŭ la proverbo „tro da kuiristoj difektas la supon". Ĝi devis pasi tra tiom da diversaj fakoj; ĉiu aldonis sian prokraston — la eta amiko estis ofte flankenŝovita pro pli „grava" revuo, pli bezonata libro, iu pli enspeziga ekstera mendo. Kongreslaboroj en 1983 intervenis, kiel ankaŭ la komputiligo de la administrado. Plie, la posedantoj de la diversaj manoj tra kiuj ĉio devis pasi ĝenerale ne sentis emocian aŭ moralan ligon al la revuo. Tion sentis la redaktoroj, kiuj ĉiam ĝustatempe kaj taŭge pretigis la manuskriptojn, sed povis poste nur ĉagreniĝi kaj seniluziiĝi pro la prokrastoj. En iu momento la pli-ol-jara prokrasto estis rekaptita en orgio de diligenteco — dek numeroj aperis ene de dek du monatoj — sed ĝis tiam la distribuado paneis, tiel ke abonantoj multlande imagis ke jam de 1985 la revuo ĉesis aperi. Sed fakte ĉiu numero en la regula serio aperis. La revuo nun estas ĝisdata.

La solvo estas recentrigi la prepar-laborojn; la redaktoro ne nur redaktu sed ankaŭ mem faru la teknikajn prepar-laborojn — komposti kaj enpaĝigi ĉion. Tio estas fakte nur unusemajna laboro. Se la redaktoro estus ankaŭ artisto, centriga efikeco estus kompleta. Feliĉe la gazeto ĝuas delonge la kunlaboron de profesia ĉeha desegnisto, Pavel Rak. Liaj desegno-filmoj foje aperas en la hungara televido.

Rimarko de la redakcio: En GDR „Juna amiko" estas abonebla ĉe Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb des PZV, Übigauer Str. 4. Falkenberg 7900

BIBLIOGRAFIOJ

ESPERANTO ROLAS EN INTERNACIA LINGVISTIKA BIBLIOGRAFIO [1])

Denove aperis Esperanto-ĉapitro en la granda jara bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA). Jus aperis la bibliografio por 1985. En kvin volumoj la kompilajo listigas pli ol 42 000 sciencajn artikolojn, kiuj aperis dum la jaro. La kvin volumoj traktas (1) literaturojn de anglalingvaj landoj (inkluzive neanglalingvajn minoritatajn literaturojn), (2) literaturojn de aliaj mondopartoj, (3) lingvistikon, (4) ĝeneralan literaturon (t. e. verkoj ne limigitaj al unuopaj literaturoj aŭ geografiaj lokoj) kaj (5) folkloron.

La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo. La ĉapitro „Helplingvoj: Internaciaj Lingvoj" enhavas 310 erojn, kiuj plejparte traktas la lingvistikon de Esperanto. Tio reprezentas ioman kreskon kompare kun antaŭaj jajroj (1982: 253 eroj; 1983: 241 eroj; 1984: 286 eroj). Por ĉiu ero aperas ĉiuj bazaj bibliografiaj informoj, kaj oni ankaŭ detale analizas ĉiun eron laŭ temo kaj subtemoj. Tiuj temoj kaj subtemoj estas siavice listigitaj en tema indekso por la tuta bibliografio. La tema indekso estas giganta: en presita formo ĝi ampleksas pli ol 3 000 kolumnojn de grandformata volumo.

Kompilis la ĉapitron „Helplingvoj: Internaciaj Lingvoj" d-ro Humphrey Tonkin kaj d-rino Jane Edwards (Usono) kun helpo de d-ro W. A. Verloren van Themaat (Nederlando). La bibliografio, **1985 MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures,** estas konsultebla en ĉiuj ĉefaj esploraj bibliotekoj de la mondo.

Aldone al ĝenerala sekcio pri Esperanto, la Esperanto-ĉapitro traktas verkojn pri Esperanto laŭ la jenaj subsekcioj: dialektologio, gramatikaj kategorioj, prepozicio, pronomo, verbo, leksikologio, etimologio, leksikografio, terminologio, vortpruntado, morfologio, vortkonstruo, onomastiko, fonetiko, parolsintezo, fonologio, silabigo, pragmatiko, prozodio, semantiko, stilistiko, sintakso, aspekto, kazo, negado, voĉo, tradukado, maŝintradukado, ortografio, interpunkcio.

[1]) Kp. ankaŭ la artikolon en „de" 128 (4/86), p. 83]

„Sprachwissenschaftl. Informationen"

La dua volumo (10/I kaj 10/II, Berlin 1986) de la centro por lingvoscienca informado kaj dokumentado aperis fine de 1986 en Berlin. Ĝin eldonas la Akademio de Sciencoj de GDR (Centra Instituto por Lingvistiko). Pri la unuaj du volumoj, aperintaj 1985 ni informis en „de" 138 (4/86). En la rubriko 16. „Planlingvoj" de la volumoj ni trovas ĉi-foje 22 titolojn de interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj, recenzoj, raportoj pri internaciaj sciencaj aranĝoj k. s.

Oni aliloke trovas krome 12 pluajn indikojn, do sume 34. Ĉiu volumo de la serio entenas la materialojn de la pasinta jaro. Krome oni trovas postrikoltan ĉapitron. La volumoj por 1985 do entenas ĉimaniere ankoraŭ indikojn por 1984.

Vok vu Uropi?

Vok vu Uropi?

Tiel demandis fine de novembro 1986 iu FRG-a gazeto[1]) sian legantaron. „Vok vu Uropi?" signifas „Ĉu vi parolas la eŭropan lingvon?". La gazeto oferas trikolumnan artikolon, 189-linian! Kio troviĝas malantaŭ tio?

La 37-jara franco Joël Landais, instruisto por la angla en la teknika gimnazio de Chartres, naskis antaŭ nelonge novan lingvoprojekton. „Mi nenion eltrovis", li diris en la gazeta intervjuo. „Mi nenion fabrikis. Ĉio apogas sin sur hindoeŭropaj vortradikoj!" Diris tion kaj baptis sian infanon „Uropi".

Ho, jen pensas kvalifikita esperantisto, tiu homo elpensis je la dua fojo Esperanton! Ne, Landais kontraŭas al Esperanto. Li asertas, ke Esperanto estas lingvo de la 19-a jarcento kaj dum tiu epoko la klerigitaj tavoloj ja parolis la latinan. Ja, Esperanto, li diris, konsistas je 80 procentoj el la latina lingvo. Do: Esperanton oni nur povas regi sciante la latinan ... nu, ni pli bone scias, ke ne estas tiel!

„Kiu volas parkere lerni ‚Uropi'", skribas la gazeto pri la Landais-a lingvoinfano, „nek devas penadi pri komplikaj deklinacioj nek pri neregulaj verboj". Do ĉu Esperanto? Donita ekzemplo montras, ke la franco fakte elpensis novan lingvon. La litero „o", per kiu ĉiuj „Uropi"-verboj finiĝas, estas forprenita kaj pronomo aldonita: „Voko" (paroli) kaj „i vok" (mi parolas). Pliajn ekzemplojn la aŭtoro de „Uropi" prisilentas en la gazeto. Do, jenon! La nombro tri en „Uropi" estas „tri"! Nu, vidu!

Jam 9237 kapvortojn nombras amaŭ manskribitaj „Uropi"-vortaroj de Joël Landais. Cetere, li nomas sian lingvon „sintetikan" kaj Esperanton „artefaritan". Ĉu iu povus klarigi al mi la diferencon?

Kaj plia eldiraĵo de Landais: „‚Uropi' estas tute demokrata lingvo!" Ĝis nun mi nur konis aliajn lingvospecojn: etnajn, planitajn ktp. Demokrata la nova lingvo estas, tiel ĝia aŭtoro, ĉar ĝi apogiĝas je 40 procentoj sur la romanaj, je 40 procentoj sur la germanaj kaj je 20 procentoj sur slavaj lingvoj ... La konfuzita esperantisto nun pensas pri la konsisto de sia lingvo Esperanto. Krome ĉiu scias, ke lingvo neniam povas alpreni „demokratajn" ecojn — al lingvo estas tute egale, kiu parolas ĝin, ĉu demokrato aŭ nedemokrato. Lingvoj estas neŭtralaĵoj kaj ne havas politikan opinion ... ni ne profundiĝu en tiun ŝajnan „demokratecon", ĉar tio rompus la kadron de ĉi tiu temo.

Lingvo — ĉu „Uropi" jam meritas tiun ĉi nomon? Lingvo ja fariĝas lingvo, kiam almenaŭ du homoj kapablas uzi ĝin. La artikolo donas tiurilatan respondon: „Ankaŭ kun sia edzino li (la eltrovinto) parolas la ‚Uropi'-lingvon". Ege disvastigita lingvo, ĉu ne?

„Uropi" ŝajne signifas „Eŭropo". Landais klare celas al eŭropaj lingvouzantoj. Internacia lingvo por homoj en la tuta mondo „Uropi" tial neniam povas esti. Se la aŭtoro penus enpenetri Esperanton, tiam li sufiĉe frue povus ekkoni ties valoron.

Iam ajn neniu plu parolos p r i „Uropi", jam tute ne e n „Uropi". Same kiel okazis pri ĉirkaŭ 1 000 aliaj lingvoprojektoj, kiuj kuŝas kiel mortnaskitoj en la tirkestoj de iliaj kreintoj! **joŝo**

[1]) (Frankfurter Rundschau, 24. 11. 1986]

Satira libreto el Leipzig

En Leipzig la Urba Estraro de GDREA eldonis libreton sub la titolo „Hunda vivo kaj aliaj satiroj". Aŭtoro estas leipziga esperantisto, kiu kaŝas sin malantaŭ la pseŭdonimo „Le' Psiko". Tiu ĉi libreto estas kompostita kaj presita per plej modernaj teknikaj rimedoj kaj ampleksas 48 paĝojn. Prezo: 7,50 markojn. Mendeblas ĉe: **Literatura Servo, P.O. p.k. 713, Leipzig, DDR—7010.**

[Sekvos recenzo]

Pri „Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio"

Pri ĉi-tiu libro, verkita de prof. d-ro Stanislav Kamarýt aperis recenzo el la plumo de la historiisto Siegfried Linke en „der esperantist" 138 (4/1986), p. 87—88.
Reage al ĉi-tiu recenzo ni ricevis leteron de du el la editoroj, de Jaroslav Mařik el Praha kaj inĝ. Jan Werner el Brno.
Ni citas el la leteroj, ĉar ili sendube tuŝas gravajn punktojn de la savo de historiaj materialoj kaj pliklarigas la valoron de la recenzita materialo:

„La recenzinto ion laŭdas, ion kritikas. Recenzanto povas kritiki. La ĉefa motivo de tiu ĉi kritiko estas, ke **la verko ne estas historio, sed kroniko.** Evidentiĝas, ke la editoroj estus pli bone farintaj ne titoli la verkon „historio", sed kroniko. Tiukaze forfalus la motivo de la kritiko. La editoroj estas lasintaj la titolon „Historio", ĉar dum jardekoj (1955 — 1980) oni ĉiam uzis la terminon „historio", parolante pri la manuskripta verko de Kamarýt.
Efektive, d-ro Kamarýt postlasis la manuskripton **sen titolo;** ĝin elektis, post interkonsiliĝoj, la editoroj, kaj sciante, ke ne temas pri historio en la vera, scienca senco, mem aldonis la subtitolon „Iom da historio, iom da rememoroj", por eviti eventualan malkonsenton de iu legonto. Videblas, ke ankaŭ tiu ĉi koncedo ne estas akceptebla por iu (La ĝisnunaj aperintaj recenzoj ne enhavas tiupunktan kritikon).
En la antaŭparolo estas dirite, ke la verko estis inspirita el la Someraj Esperanto-Tendaroj, al kiuj mankis manlibro por la lecionoj pri la historio. La verko do pli-malpli estis konceptita por la bezonoj de SET. Kaj plilarĝigi la temaron, laŭ la sugesto de la recenzinto, tute ne eblis, por la editoroj . . .
La recenzinto imputas, evidente al la editoroj (!), la kulpon, ja eĉ intencon, pri perdigo de kelkaj paĝoj de la manuskripto, apud kiuj troviĝis la laborista temo, per meto en „d. e." de la vorto „perdiĝis" en citilojn (!). La editoroj, fakte, mem proprainiciate verkis kaj kompletigis la laboristan temon per la ĉapitro pri „Interhelpo".
Oni sciu: post la morto de la aŭtoro, en 1956, la manuskripto kuŝis, dum jaroj, ĉe la vidvino, en provinca urbeto, post ŝia morto ĉe filino, sen perspektivo pri eldono . . .
La manuskripton elpruntis dum la jaroj, laŭ nia memoro, s-ano J. Havlik en Prago (unu ĉapitro estis enpresita en la Bulteno de EK en Praha), kaj unu el la ministerioj, kiu montris apartan intereson (kaj supozeble fotokopiis). Tre verŝajne, ja eĉ certe, per tiu pruntado la kelkaj paĝoj fariĝis perditaj. La heredinto, la vidvino, poste serĉis ĉe la pruntintoj perletere la perditaĵon, sen rezulte. Do, nek la aŭtoron nek la editorojn iu rajtu kulpigi, eĉ nur per la „citila" aludo, pri suspektinda ago!!
Ni evitas la diskutendan anstataŭigon de „ĉeĥoslovaka" per „ĉeĥa". La libro ja priskribas la movadon en la tuta ŝtato. La relativa malmulto da faktoj pri la orienta parto de nia ŝtato fontas el tio, ke la movado antaŭ la milito estis tre malforta, tie.
La recenzinto preteratentas nian konkludon en la antaŭparolo de la libro: „Ne estas necese, polemiki pri tio, ĉu la verko estas nura kronika de la movado, ĉu rememoroj de unu el niaj unuaj kaj elstaraj pioniroj de la movado, ĉu kompetenta scienca prihistoria verko. Ni scias, ke ni helpis SAVI verkon gravan . . . Ni deziras, ke ĝi estu kiel tia akceptita de la publiko . . .
Se la recenzinto ne agnoskas aŭ malakceptas tiun nian opinion, la editoroj povas opinii, ke estus pli bon, pli celtrafe, se ili tute ne estus entreprenintaj tiun plurjaran lacigan laboron de kolektivo kaj lasi tiun riĉan materialon, estonte neniam plu kolekteblan . . . al malsavo, pereo.
Ni ambaŭ dubas, ĉu nun iu, ekz. en via lando, kapablus same kolekti tian informaron, ekde la movado-komence en tiu lando. (Same estus en nia lando, nun, sen Kamarýt.) Ni antaŭtimas, ke granda parto de la historiaj faktoj perdiĝis (en via lando speciale) kun la forpaso de la memorantoj, en forgeson, malsaviĝis, ĉar neniu estus surpreninta la laboron ilin, almenaŭ kronik-maniere, kolekti en volumon. Same estus nun, kiel dirite, en nia lando, se Kamarýt, esperantisto kaj funkciulo ekde la komenco de la Movado, ne estus obeinta la alvokon kaj farinta sian eblon. Eĉ cento da historiistoj ne helpus, se mankus fontoj. Teoriumado bazita sur nuraj hipotezoj estus malpli valora ol kroniko.
La laborajo de Kamarýt kaj de la editoroj tiel povas foje bone servi kiel riĉa fontaro por science ellaborita historio. Jen la ĉefa merito. Sub tiu lumo la recenzo en „d. e." ne ŝajnas al mi serioza." Jaroslav Mařik, Jan Werner

La aŭtoro de la recenzo, Siegfried Linke, reagas per respondo, kiun ni represas i. a. ankaŭ pro tio, ĉar ĝi tuŝas iujn principajn problemojn de recenzado. Leginte la recenzon kaj la du reagojn, la leganto mem formu al si opinion:

„1. La **unu grava tasko de recenzo** estas informi la homojn, kiuj grandparte ankoraŭ ne legis la libron, pri ties enhavo, celo kaj signifo. Mi plenumis tion klopodante pri afableco kaj objektiveco.
Per du trionoj de la recenzo-amplekso mi prezentis la aŭtoron, la enhavon kaj la strukturon de la verko, ĝian fariĝon. Mi alte taksis la klopodojn de la aŭtoro, la signifon de la libro kiel gravan historian fonton ĝuoriĉan legaĵon, samkiel la gravan kaj grandegan eldonlaboron de la editoroj.
Por homoj kun objektiva rigardo tio ĉio estas legebla en la recenzo. Sole unu triono de la recenzo okupiĝas pri kritika traktado, kiu esence rilatas al du punktoj:
— al la pretendo esti „historio" (tio ne estas kritiko pri la eldono, sed pri la nomigo de la verko);
— al la teoria koncepto de la aŭtoro kaj sekve al lia metodiko (tio ne celas al la editoroj — ĉar ili ne verkis la libron, kaj ne povas celi al la aŭtoro — ĉar li ne plu verkas, sed al la legontoj kiel informo, por ke ili konvene enkadrigo la rememorojn kaj faktojn en la libro).
2. La kritikletero de Mařik/Werner vere rilatas sole al mia unua kritikpunkto kaj klarigas la estiĝon de tiu titolo „historio" interne de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado.
Ĉio alia estas misinterpretoj aŭ imputoj.
3. La **dua grava tasko de recenzo** estas laŭfaka kritika sinteno al la verko, aŭtoro kaj editoroj — sed unuavice ne pro komplezo

aŭ kondamno al la aŭtoro (aŭ eĉ vendohelpo al la editoro), sed por servi al la legonto de la libro.
Pri tiu grava recenzotasko kelkajn subpunktojn:

3.1. Ĉie kaj ĉiam estas nepre postulende, ke la titolo kaj la enhavo de verko (pri scienca afero) kongruu.
Ne meritas la titolon „hidroenergetiko" verko ehavanta vojaĝ-priskribojn pri valbarajo. Same faktokolekto kaj subjektivaj rememoroj ankoraŭ ne fariĝas „historio". Se la Esperanto-movado intencas konvinki la sciencistojn, la scienca, aŭ scienc-simila, agado de la Esperanto-movado devas esti serioza. Sur naturscienca kaj teknika terenoj oni klopodas pri tio, sed ankaŭ urĝe necesas tia sinteno en tereno de la t. n. sociaj sciencobranĉoj, kie hodiaŭ ankoraŭ svarmas ofte la diletantismo.

3.2. Historiisto nur povas mezuri historian verkon per sia laŭfaka mezurilo, t. e. la principoj de la historiografia metodologio, eĉ ankaŭ se ne plaĉas tio al la aŭtoro/editoro.
Do historiisto devas travidi la prihistorian tekston, ĉu ĝi ne vundigas la bazajn leĝecojn de la historia scienco, ĉu ĝi respektas la specialan metodikon de tiu scienco.

3.3. Mi jam menciis, ke recenzo unuavice estu helpilo, orientigilo por la legonto. Recenzo do devas esti kritikema: „Eldoni verkon invitas kritikon" (M. Boulton). Tio ne signifas malafablecon al la aŭtoro/editoro aŭ aroganteco de la recenzanto, sed tio estas la vera esenco de la recenzo.

3.4. Oni konsideru „kritikon" ne sole kiel negativajon. Kritiko ankaŭ enhavas (laŭ mi tio estas la plej grava) pozitivan sencon: pro la pli granda persona distanco al la kreajo recenzanta fakulo pli sobre, objektive povas vidi la makulojn, mankojn, taksi la verkon ol la „gepatroj" mem. Tiele la recenzo helpas plibonigi la duan eldonon aŭ sekvan verkon, krom tio esti orientigilo por legonto.

3.5. La historia scienco ĉiam ankaŭ enhavas politikan momenton (ĉar: la hodiaŭa historio estas la hieraŭa politiko) — ĉu klare aŭ kaŝite esprimita en la teksto. Samkiel la aŭtoro rajtas esprimi sian histori-politikan starpunkton ankaŭ recenzanto.
La diverĝantaj prijuĝoj kaj opinioj servas al la scienca diskuto por trovi la objektivan veron. Uzi la malsamajn opiniojn por atakoj (eĉ ofendoj) maldecas kaj devas esti rifuzataj. Konsistante el diverĝaj elementoj, la scienca diskuto devas esti gvidata sobre, fake motivigite, orientite al la faktoj kun la celo, komune eltrovi ha komplikan veron, librere de imputoj, alpersonaj atakoj aŭ ofendoj.

4. Ankoraŭ pri kelkaj detaloj de la kritikletero.
La vorto „perdiĝis" posedas citilojn, ĉar estas citajo, kvankam unuvorta, samkiel en la recenzo la vortoj „Interhelpo", „sensperta infanon", k. a.
Mi ne aprobas kaj uzas la citilojn mok- aŭ ironicele, ĉar tio ne konvenas en la scienca diskuto . . .

5. Resumante: mi **komprenas** la editorojn, se ili post tiu longtempa kaj pena laborego eldonis gravan verkon — kaj rikoltas kritikon (ne sole!). Mi **ne komprenas** la editorojn, se ili senrajtigas ajnan fakulon esprimi sian laŭfakan opinion pri fakkoncerna libro, aŭ eĉ anticipe malpermesas kritikon (vd. antaŭparolon: „Ne necesas polemiki . . .").
Sed mi ne nur ne komprenas, sed **kontraŭas,** se eldonintoj reagas per netaŭgaj personaj ofendoj kontraŭ recenzinto („ne serioza", „nenormala", „ne klerigita" ktp.). Tamen tiun lastan mi pretervidas, ĉar nur elvokas kverelojn nebezonatajn en nia hodiaŭa tempo kaj movado."

Siegfried Linke

Kiel esprimi kontraŭan opinion? Publika letero al Lothar Müller

Mi esperas, estimata sinjoro Müller, ke mi ne ĉagrenas vin per miaj pensoj kaj mi ankaŭ ne deziras iamaniere ataki vin mem. Via publika letero al Rikardo Ŝulco, en „der esperantist" n-ro 6/86, instigis min al pripensado pri la maniero esprimi kontraŭan opinion rilate alian lingvan koncepton.
Neniam ĉiuj homoj havas la saman opinion, ankaŭ se temas pri la sama afero. Tial oni bezonas interŝanĝon de ideoj, por kio ankaŭ servas la disputado. Sed la disputado estu serioza kaj digna. Oni ne celu ataki aŭ eĉ kalumnii homon pro alia opinio pri io. Kiu atakas homon, tiu sentas mankon de gravaj kontraŭ-argumentoj kaj tial celas unue malaltigi la kontraŭulon per sugestiaj malĝustaj konstatoj pri li, kiuj estas vestitaj en demanda formo. Nur kiel dua etapo tiam sekvas la kontraŭa opinio. Jen ekzemplo el via letero: „Kial vi nepre intencas esti „la" normiga kapo en esperantio." Tio estas pura aserto de vi, kiu provas puŝi la legantaron al antaŭjuĝo pri s-ro Ŝulco. Jes, Rikardo Ŝulco havas kapon, sed neniam li sidigis sin sur tronon kaj nomis sin normiga kapo aŭ lingva reĝo. Sed konforme al la vero estas, ke R. Ŝulco ĉiam pledis por la Fundamento kaj la Zamenhofaj lingvaj ekzemploj kiel „normigan kapon" en Esperantujo. Por atingi vian celon, vi ne limigas vin je nur unu malkorektajo. Vi daŭrigas sen peno: „Nun viaj legantoj diras al vi, ke la rezulto de tiu ĉi provo . . . ne plaĉas." Tio estas aŭ arogantajo (vi parolas en la nomo de iuj ajn mistikaj legantoj, kiuj en sonĝo — aŭ eĉ revo — nomumis vin legantara advokato) aŭ ruza manovro por celkonscie influi viajn legantojn (por ke tiuj estu pretaj sin akomodi al la opinio de „ĉiuj"). Se nun Rikardo Ŝulco ŝajnas esti izolita sola voĉo en la dezerto, tiam vi venas al la „logika" konkludo: „Pri kio do disputi?" Jes, vi kondukas viajn legantojn tre lerte.
Laŭ mi vi povas publike eldiri vian opinion kiel vi volas. Estas tute via persona afero. Sed, vi ne altrudu al la esperantistaro vian opinion en la kostumo de legantara advokato, kiu parolas por ĉiuj legantoj. Parolu por vi mem kaj ne provu kapti viajn legantojn per la kaptilo de la antaŭjuĝo kontraŭ persono kaj ne uzu duonverojn!

Salutas vin ne viaj legantoj
sed via leganto
Karlo-Henriko Somero

Ankoraŭ pri Eiiĉi Doi-Cuĉii

Nia revuo publikigis du materialojn pri la tombo de la japana esperantisto Eiichi Doi-Cuĉii en la urbeto Marbach, en GDR [vidu „der esperantist" 137 (3/1986), p. 58 kaj 141 (1/1987), p. 14 — 15].

Intertempe ni ricevis pluan informon de Marianne Dörner el Meissen (8250, Karl-Liebknecht-Str. 22). De sia japana leteramikino Sano Hisako, kiu ankaŭ serĉis informojn pri la japano ripozanta sur germana tero, ŝi ricevis leteron de 20an de oktobro 1986, el kiu ni citas: „Jes, mi finfine petis al la granda jurnalo, serĉi liajn parencojn, kaj tio sukcesis.

La anonceto aperis dufoje (31. 3. 86 kaj 4. 9. 86). Pli ol 20 personoj telefonis al mi: 1 nevino, 1 kuzo, 3 gefiloj de la kuzoj, 2 tiamaj amikoj kaj aliaj, kiuj sciis ian informon pri la parencoj. Mi surpriziĝis, ĉar tiel multe da homoj frue prezentis al mi la konon, kaj tiuj ankoraŭ bone memoras kaj amas Eiiĉi Doi-Cuĉiin. Kelkaj el ili ne nur rakontis la memorojn, sed ankaŭ sendis librojn. Leginte ilin, mi trovis la nomon de lia plej intima amiko, s-ro Onoda. Laŭ la libro s-ro Onoda ankaŭ lernis Esperanton kune kun Eiiĉi, kaj de tiam, kiam Eiiĉi fariĝis malsana, s-ro Onoda zorgis lin, eĉ flegis lian lastan momenton. Estis ne certe, ĉu li vivas. Sed mi ne povis elteni mian deziron, ke mi provu telefoni al li. Ĝojinde! Mi sukcesis interparoli kun s-ro Onoda! Li estis tre ĝoja, kaj profunde dankas vin ĉiuj. Li diris jene: Post la morto de Eiiĉi, la patrino danksalutis al s-ro Onoda pro lia amikeco, kaj kondukis lin al la vilao, kie malsana Eiiĉi foje ripozis. Tiam ili hazarde trovis lian testamenton en tirkesto de lia skribtablo. S-ro Onoda ankoraŭ ofte rememoras sian plej intiman amikon. Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj li petis germanan doktoron M. Störr, kiu venis al Japanio, serĉi kaj esplori la staton de la tombo. D-ro Störr sendis la leteron.

Finante s-ro Onoda diris: „De kiam mi ricevis la leteron, ĉiam mi havas deziron viziti la tombon, sed ne povis realigi tion. Mi hezitis, ĉar mi ne povas paroli libere germanan lingvon. Se estos eble, ke ni (mi, vi kaj aliaj konatoj pri Eiiĉi) povus viziti GDR kaj la tombon, kiel multe mi estos ĝoja! Bonvolu sendi kopion de la letero al via amikino Marianne audinte paroladon, ankaŭ mi havis saman deziron.

Do, mi prezentas la informojn pri Eiiĉi. Li naskiĝis en la urbo Sendai, situanta en la norda parto de Japanio. Lia patro, la fama poeto Bansui Doi, estis profesoro de altlernejo laŭ la malnova sistemo (nuna ŝtata universitato Tohoku). Li instruis anglan literaturon, kaj oni estimis lin kiel grandan literaturiston kaj instruiston. Eiiĉi havis du fratinojn (ambaŭ pli aĝajn ol li). Li estis de sia infaneco tre inteligenta, brava kaj sufiĉe sana, sed kiam li estis 16 jaraĝa, li ial malsaniĝis je pulmoj. Dum li ripozis por resaniĝo, la pli aĝa fratino prezentis la ideon de Zamenhof, kaj rekomendis lerni Esperanton. (Ŝi ankaŭ estis tre saĝa kaj bonkora, sed pro sia pulma tuberkolozo mortis 1932). Eiiĉi samopiniis kun la ideo de Zamenhof kaj tuj li komencis lerni la internacian lingvon. Plie li fondis klubon kaj alvokis al la tuta lernejo. Kvankam li devis ripozi hejme pro sia malsano, li fervore lernis kaj aktive laboris por Esperanto.

Intertempe li kaj s-ro Schröder tre ofte skribis leterojn. Kiam s-ro Onoda alkuris al la lito de Eiiĉi, laŭ lia informo estis du horoj antaŭ la morto de Eiiĉi, Eiiĉi spiregante petis al li, peni realigi „la sistemon de poŝtmarkoj kun kontribuaĵo". Ĉar li sciiĝis kaj taksis tiun sistemon pere de la korespondado kun eksterlandanoj, eble kun s-ro Schöder. Li deziris realigi tiun sistemon en Japanio, por ke oni uzu la kontribuaĵon por lepruloj (tiutempe ankoraŭ vivis tiuj en Japanio). S-ro Onoda kaj la patro de Eiiĉi klopodis por tio post la morto de Eiiĉi, kaj la sistemo realiĝis (sed bedaŭrinde ĝi estis malproksima de lia vera deziro, ĉar unua kontribuaĵo ne estis uzata por lepruloj, sed por konstui aerohavenon) . . . ankoraŭ mi volas prezenti alian fakton. Tio estas la artikolo (ne anonco). En la komenco de oktobro, ni (mi kaj mia gvidantino) akceptis jurnaliston el la ĵurnala eldonejo Assahi. Laŭ lia peto mi prezentis la rakonton, kiun vi skribis al mi, kaj la informojn, kiujn kelkaj personoj rakontis. Post kelkaj tagoj publikiĝis la artikolo pri via letero, la tombo, la amikeco inter s-ro Schröder kaj Eiiĉi Doi-Cuĉii, via vizitado al la tombo kaj laboro de Eiiĉi. Tiun tagon, kaj poste kelkaj miaj konatoj, kiuj legis la artikolon, telefonis al mi. Tiuj estis kortuŝitaj kaj havis simpation al vi kaj viaj grupanoj. Mi utiligis tiun okazon por propagandi Esperanton . . ." **Jen el la letero de s-ino Sano Hisako. La amikino de Marianne Dörner el Meissen.**

„El Popola Ĉinio" pri GDREA

Dum la lasta tempo la konata ĉina revuo publikigis kelkajn materialojn de GDR- esperantistoj respektive pri GDR. Jen superrigardo:

— Li Shijun: En kaj ekster la Internacia Seminario de Bad Saarow. EPĈ, 4/1986, p. 24 — 26
Treege simpatia artikolo pri la restado de la konata ĉina esperantisto, vicĉefredaktoro de EPĈ en GDR, lige al la internacia metodika seminario de 9a ĝis 14a de decembro 1985 en Bad Saarow

— Michael Behr: Pledo por terminologia laboro. EPĈ 6/1986, p. 26 — 27
Pri graveco kaj problemoj de internacia terminologia laboro en Esperanto

— Wera Dehler (nun: Blanke): Nova ŝanco terminologio. EPĈ 8/1986, p. 10 — 12
La fundamenta artikolo pri la nova organizado de sistema terminologia aktivado en Esperanto.

— Ĝou Ĉjanjun: Renkontiĝo de esperantistoj en Lepsiko. EPĈ 10/1986, p. 62— 64
Tre simpatia artikolo de s-ino Ĝou, direktorino de la Esperanta fako de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, kiu partoprenis IFER/86 kaj krome la Foiron de Leipzig (Lajpcig aŭ Lepsiko).

Esperanto-Briefmarken in sozialistischen Ländern

(Bisher verausgabte Sondermarken zur Thematik „Esperanto" in den sozialistischen Ländern)

UdSSR

1925: 2 Werte (7 und 14 kop. mit Aufdruck in E: INVENTISTO DE RADIO POPOV

1926: 2 Werte (7 und 14 kop.) mit Aufdruck in E: 6A INTERNACIA PROLETARIA ESPERANTO-KONGRESO

1927: 1 Wert (14 kop.)
1887 — 1927 ESPERANTO mit Porträt Zamenhof

1930: 1 Wert (1 Rubel) mit Aufdruck in Esperanto: CENTRA TELEGRAFO MOSKVO

1930: 1 Wert (3 Rubel) mit Aufdruck in E: VOLHOV HES JE LA NOMO DE LENIN
170 postalische Karten und Kuverts mit postalischem Aufdruck in E: Poŝta Karto oder Fermita Letero

Bulgarien:

1947: 1 Wert (20+10 Lewa) mit Aufdruck:
1887 — 1947 ESPERANTO JUBILEA KONGRESO

1957: 1 Wert (44 stotinki) mit Aufdruck:
70 JAROJ DE ESPERANTO ...

1959: 1 Wert (1,25 Lewa)
AUTORO DE ESPERANTO ZAMENHOF (1859 — 1959)

1962: 1 Wert (13 stotinki)
35. bulgarischer E-Kongreß

1963: 1 Wert (13 stotinki)
48A UNIVERSALA KONGRESO ESPERANTO SOFIO 1963

1978: 1 Wert (13 stotinki)
63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO VARNA 1978

Ungarn

1957: 1 Wert (60 filler)
1887 — 1957 ESPERANTO LINGVO INTERNACIA
1 Wert (1 Forint)
1859 — 1959 AUTORO DE ESPERANTO L. L. ZAMENHOF

1962: 1 Wert (1 Forint)
14a ESPERANTO-KONGRESO DE IFEF

1983: 1 Wert (2 Forint)
68a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Polen

1959: 1 Wert (60 gr.)
1959 JUBILEA JARO DE ZAMENHOF

ČSSR

1967: 1 Wert der PRAGA-serie mit Aufdruck in E: (2 kčs)
TUTMONDA EKSPOZICIO DE POŜTMARKOJ

In Ungarn, Polen und in der ČSSR wurden darüber hinaus mehrere Sonderpostkarten und Sonderumschläge verausgabt.

Esperanto-poŝtmarko en Kubo

La Poŝta Administracio de la Ministerio por Komunikado en la Respubliko Kubo komunikis pere de la poŝta informcirkulero 04/1987 la eldonon de memoriga postmarko okaze de la centjara jubileo de Esperanto: Jen la teknikaj datoj:
Eldontago: 16a de marto 1987
Eldonkvanto: 1 145 100 pecoj
Nominale valoro: 30 centavoj (cendoj)
Papero: Kromo
Preso: Ofseto
Dentumo: 12,5
Grafikisto: Miguel Angel Penate
Lige kun tiu poŝtmarko aperis unuataga koverto kaj memoriga poŝta Esperanto-stampo. Ni kore gratulas al Kuba Esperanto Asocio, fondita la 16an de junio 1979, pro tiu granda sukceso!

*

Esperanto-filatelaĵoj en la Jubilea Jaro 1987

Laŭ jam publikigitaj eldonplanoj aperis 1987 en sekvaj landoj jubileaj Esperanto-poŝtmarkoj: Brazilo, Bulgario, Ĉinio, GDR, Kubo kaj Pollando. Tiujn eldonaĵojn akompanos unuatagaj kovertoj kaj memorigaj poŝtaj Esperanto-stampoj. Krome ni eksciis pri marko-koverto kun surpresita Zamenhof-poŝtmarko en Sovetunio kaj pri poŝta karto kun surpresita Esperanto-poŝtmarko en Hungario. Jubileaj Esperanto-poŝtkar-

toj jam aperis en GDR kaj GFR. Afrankstampo „100 jaroj de Esperanto" funkcias jam tutan jaron en Bad Hersfeld/FRG. Memoriga datstampo „100 Jahre Esperanto" funkciis dum marta 1987 en Leipzig. Filatela kuriozaĵo lige kun la centjara jubileo de Esperanto estas itala poŝta stampo el urbo Montagnana, kiu jam per la dato 13. 5. 1978 popularigis la 100-jariĝon de Esperanto.

R. Burmeister

Alvoko por internacia arta konkurso „Ni infanoj ŝatas la pacon" kaj „Konservu la pacon por infanoj"

En aŭgusto 1988 okazos en la urbo Karl-Marx-Stadt (GDR) la VIII-a renkontiĝo de la pionirorganizaĵo „Ernst Thälmann". La membroj de tiu infana asocio de GDR dokumentos, kiamaniere ili partoprenas la batalon por paco kaj amikeco inter la popoloj. La distrikta junulara sekcio Karl-Marx-Stadt de GDREA volas kontribui al la preparo de tiu renkontiĝo. Pro tio ni alvokas ĉiujn artistajn esperantistojn (hobiajn aŭ profesiajn) partopreni nian internacian artan konkurson.

Knokursaj kondiĉoj

1. Temoj kaj aĝaj klasoj

Oni povas sendi artajn verkojn de ĉiuj specoj: pentroarto, grafiko, skulptado, fotografio ktp. La kadraj temoj estas:
por infanoj ĝis 14 jaroj — „Ni infanoj ŝatas la pacon"
por junuloj kaj plenkreskuloj — „Konservu la pacon por infanoj"

3. Sendado de la verkoj

Ĉiuj kontribuoj por la konkurso devas esti senditaj ĝis la 15-a de aprilo 1988 al la prezidanto de la junulara sekcio Karl-Marx-Stadt de GDREA:
Christian Papenmeier, Obere Hauptstraße 104, Oelsnitz, DDR, 9156. Nepre aldonu la precizan adreson kaj la naskiĝtagon!

3. Ekspozicio

Ĉiujn recenzitajn verkojn ni montros dum la VIII-a renkontiĝo de pioniroj en Karl-Marx-Stadt. Post tiu aranĝo ni uzos la verkojn por pluaj ekspozicioj en kadro de GDREA. Resendado nur en eceptaj kazoj eblas.

4. Premiado

Ĉiu konkursanto ricevos diplomon. La plej bonajn verkojn (kiujn elektos specialistoj) ni premios per
— filatelistaj suveniroj de VIII-a pionira renkontiĝo
— bildalbumoj de Karl-Marx-Stadt
— insignoj
kaj aliaj objektoj.
Ni petas ĉiujn arte laborantajn esperantistojn partopreni multnombre kaj kreive tiun internacian konkurson.

La membroj de la distrikta junulara sekcio Karl-Marx-Stadt de GDREA

Letero de leganto

Nia leganto Oskar Stolberg el Leipzig skribis al ni pri la listo de Alfred Knapp en „de" 140 (6/86):
La verko estas diligenta laboro. Sed mi konstatis, ke ĝi ne estas korekta. La poŝvortaro de E.-D. Krause enhavas 21 de la cititaj vortoj, la komplementa vortaro de Walter v. Waldowski 5. Ambaŭ vortaroj ne estas homogenaj. Ĉar la vortaro de Waldowski prefere estas leksikono faka, mi atendis la inversan rezulton. Sed la vortolisto de l'aŭtoro havas nur duban valoron. Ĝi enhavas multe da neologismoj, kiuj eĉ ne estas troveblaj en PIV. Mi ne kredas, ke la Akademio aprobas ilin.
Bedaŭrinde la aŭtoro ne nomas ĉiam la tradukiston (kreinton) de la vortoj. La literatura fonto ne sufiĉas. Oni serĉas vortojn de Kucharski, nek en Krause nek en Waldowski. Pere de la poŝvortaro de Krause oni povas legi multe da literaturo. Por la poezia literaturo estas necesa alia vortaro ol poŝvortaroj. Cetere, la aŭtoro estas membro de Esperanto Ŝak-Ligo Internacia. Urĝas ŝak-vortaro.

Oskar Stolberg

Demando de leganto:

Kia utilo de la vortlisto de A. Knapp?

Nia leganto Hans Schulze el Neudorf demandas pri la utilo de la vortlisto de Alfred Knapp, kiun ni publikigis en „der esperantist" n-ro 140 (6/86), p. 133 — 136.

Jen nia respondo

Unue ni devas rimarkigi, ke la listo longe kuŝis en nia manuskriptujo, ĉar ĝai publikigo al ni ne ŝajnis urĝa. Tamen, ĉiam denove ni ricevis iujn demandojn pri neologismoj, kiuj ne troviĝis en la vortaroj, aĉeteblaj en nia lando. Tial ni decidis publikigi la liston, kvankam ni konscias pri ĝiaj mankoj. Unue, la fondindikoj estas tre mankhavaj kaj suprajaj. Due — la listo ne montras frekventecon, uzatecon de la koncerna vorto, kaj ne povas montri tion. Do- la publikigo de la listo tute ne estas ia rekomendo aŭ malrekomendo uzi tiun aŭ alian vorton. Sed esperantisto ofte trovos tekston, en kiu la aŭtoro — ĉu prave aŭ malprave, ĉu plaĉe aŭ malplaĉe por la leganto — uzas iujn neologismojn. La leganto de tia teksto ja havas la deziron almenaŭ kompreni ĝin. Jen — la ĉefa celo de la listo: ĝi helpu **kompreni** iujn ne ofte uzatajn respektive nove uzatajn vortojn.

La red.

„Anaseto kaj Koketo", trifabla infanlibreto de Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1985, 26-paĝa. Adaptajo de Huang Ĝjunuan, ilustrita de Ĉu Ĉuan.

Kiel ĉiam ĉarme desegnita kun instruriĉa esenco. La librotitolo estas la nomo de la unua fablo. Anaseto kaj koketo ludante en printempa naturo en bona amikeco helpas unu al alian, ĉiu per sia speciala scipovo. Ĉio estus en ordo, se la koketo ne volus fari, al kio nur kapablas la anaseto — naĝi! Kompreneble ĝi estas savita de la anaseto, ĉar ili ja helpas unu la alian!
La dua fableto, titolita „Brasiko kaj ĝia semo", priskribas la diferencajn agadmanierojn de du kunikloj. Ambaŭ, vizitante maljunan kapron, donace ricevas brasikon. La griza kuniklo ĝoje akceptas ĝin, sed la blanka nur petas pri iom da semoj, por mem kulturi brasikojn. Je la fino honteme la griza kuniklo ekkonas sian mallaboremon.
La tria fablo „Malgranda simio" priskribas la fian kutimon de la simieto ekkapti ĉiun novajon kaj forjeti manĝajojn. Avide ĝi alstrebas nur la pli grandan kaj laste staras kun malplenaj manoj. La tekstoj estas bone legeblaj por komencantoj pro la ĉiutaga vorttrezoro kaj senkomplikaj frazoj.

Edeltraud Zettier

Mongola oferto

Certe ankaŭ vi foj-foje bedaŭras, ke nia lingvo ne ĉiam estas utila, kiel ĝi devas esti. Kiam oni ekzemple vojaĝas eksterlanden, oni ne trovas samideanojn ĉe ĉiu stratangulo. Ni do ne havas eblecon kontaktiĝi kun samideano, kiu tamen loĝas en urbo, pri kiu oni interesiĝas. Jam estis provita eldoni tutmondan adresaron, sed tio ne ĉiam sukcesis. La vera praktiko estas nur la firmaj kontaktoj de esperantistoj kun esperantistoj.

La pluan sorton de nia lingvo oni ne konas. Mi plenanime, milfoje substrekas tiun ĉi finan vorton: Precipe ekstere de Eŭropo troviĝas multaj samideanoj, kiuj malofte renkontas vojaĝantajn kaj traveturantajn esperantistojn. Ofte vi rimarkos kaj akre sentos, ke aziaj, precipe mongolaj esperantistoj tre bonvenigas ĉiujn kontaktojn kaj zorgas por servoj, vizitoj kaj gastigado de vojaĝantoj, kiuj ekzemple veturas per la transkontinenta trajno inter Moskvo kaj Pekino tra Ulan-Bator, kaj donas lingvan helpon kaj akompanas ĉiujn volantulojn ktp.. Ĉi-sence ankaŭ mi bonvenigas ĉiujn vojaĝantojn. Mi invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj travojaĝas Ulan-Batoron, ekzemple per la transkontinenta trajno. Bonvenon! Mi volonte akompanos kiel tradukisto tiujn laŭplaĉe al diversaj institucioj, instancoj, muzeoj, ekspozicioj ktp., kiuj vizitas min hejme. Veturantoj povas sciigi min telefone tuj post alveno:

ofice: 35 910, hejme: 51 505.

Mia loĝadreso (ne poŝta adreso!):

C. Batzajaa, kvartalo XII-I, domo XXVII, enirejo IV, etaĝo II, loĝejo 49

(Tiu ĉi bonveniga anonceto validas ĝis fino de 1988) C. Batzajaa

Gvidlibro pri Pekino, kompilita de Laj Hajlong Pekino: Ĉina Esperanto Ligo, 1986, 162 p.

Tiu ĉi bela kaj enhavoriĉa poŝformata libro, estas ne nur helpilo kaj informilo por vizitantoj de la ĉina ĉefurbo, sed ankaŭ interesa legajo por ĉiu amiko de la ĉina popolo. Ĝi informas pri historio, kulturo kaj nuntempa vivo de Pekino kaj ĉirkaŭajo. Antaŭmetitaj mapeto de Pekino kaj koloraj bildoj donas unuan impreson kaj ebligas ĝeneralan orientiĝon pri la lokoj menciitaj en la sekvanta teksto. Por turistoj kaj dejorvojaĝantoj praktike ordigita, tiu ĉi libreto donas ilustritajn kaj gravajn informojn pri

- vidindaj lokoj (ekzemple pri Tjan'anmen-placo, parkoj. palacoj, temploj, maŭzoleoj, ĝardenoj kaj parto de la Granda Muro) sur 37 paĝoj;
- 16 muzeoj, ekspoziciejoj kaj memorhaloj sur 18 paĝoj;
- kulturo kaj eduko (ekzemple pri bibliotekoj, universitatoj kaj artismaj institutoj) sur 12 paĝoj;
- 15 hospitaloj kaj iliaj specialaj medicinaj taskoj sur 5 paĝoj;
- 28 teatraj trupoj de diversaj ĝenroj sur 10 paĝoj;
- 4 amuzeoj kaj sportejoj sur 2 paĝoj;
- 10 hoteloj, iliaj ekipajoj kaj servoj sur 8 paĝoj;
- 9 restoracioj sur 15 paĝoj;
- 10 vendejoj sur 9 paĝoj (i. a. pri la Pekina Fremdlingva Librejo);
- 12 metiartajoj kaj lokaj produktajoj sur 5 paĝoj;
- trafiko (taksitelefonnumeroj, subtera tramo, civila aviado, fervoja transportado) sur 6 paĝoj;
- bankoj kaj poŝto-telekomuniko sur 2 paĝoj;
- turismaj servoj sur 2 paĝoj;
- gravaj telefonnumeroj (i. a. de ĉiuj Esperanto-institucioj en Pekino) sur 8 paĝoj.

Precipe agrabla estas la fina konciza kronologia tabelo de Ĉinio, entenanta la nomojn de la dinastioj, la periodojn de ilia regado kaj la ĉefurbojn.

Al mia granda laŭdo mi aldonas deziron: estus agrable, se ĉiuj ĉinlingvaj nomoj de vidindaĵoj, institucioj ktp. estus esperantigotaj, kondiĉe ke ili ne portas nomojn de personoj. Hans Rogazewski

Kongreßrekord!

Der 72. Esperanto-Weltkongreß vom 25. 7. bis 1. 8. 87 in Warschau wurde zum bisher größten Kongreß in der Geschichte des Esperanto. Fast 6 000 Teilnehmer (5 960) aus 60 Ländern nahmen teil, darunter 120 Personen aus der DDR. Wir berichten im nächsten Heft.

Bulgara nuntempa poezio kaj prozo. Antologio. Kompilis Hristo Gorov,

Per tiu ĉi interesa libro prezentas sin lando „inter la pasio kaj la penso", abunda je tradicioj kiujn ankaŭ ĝiaj modernaj verkistoj versigas, vivtenas; la „lando de l'poetoj mortigitaj", kies nuntempa poezio kaj prozo firme alkroĉiĝas al ĝia granda kaj al ĝia trista historio, ĉar tiu lando „supervivis kvinjarcentan jugon" kaj „ĉar la mortintoj estis ege multaj". En ĉiu verso, en ĉiu linio la leganto kun respekto konstatas la fieron de la Bulgaroj pri Bulgario, la profundan amon kiu interplektas la landon kun ĝiaj enloĝantoj.

La leganto certe retrovos nomojn de poetoj kaj prozistoj kun internacia reputacio. La antologio enkondukiĝas per versaĵoj de Hristo Botev, Hristo Smirnenski kaj aliaj revoluciaj poetoj; sekvas poemoj kaj rakontoj aŭ romanfragmentoj de pli ol 60, plej ofte ankoraŭ vivantaj verkistoj. Bona superrigardo pri la literatura evoluo post „Bulgara Antologio" (1925) kaj „Bulgara prozo" (1960). Kaj la revolucia etoso, kaj la revoj de Botev sentiĝas en la literatura arto de la socialisma Bulgario. Kiel belaj inter tiom da heroaj vortoj tamen ankaŭ la versoj de Dora Gabe pri „Avino" kiu ankaŭ iam estis infano kaj „eta kaj petola" kaj „vesti sin ne povis sola". Kaj kiel kontraŭdira kaj fiera la poemo „Virino" de Blaga Dimitrova!

Domaĝe, tre domaĝe ke ne nur la preseraroj (listigitaj), sed ankaŭ ne maloftaj rimaj, ritmaj aŭ eĉ lingvaj malebenaĵoj iom malutilas al la efiko de la libro. Ulrich Becker

Henryk Sienkiewicz, Noveloj. Reeld. de Ritmo, Varsovio 1985, 12 x 18, 65 p. Trad. el la pola lingvo de Lidja Zamenhof.

Enkondukoj: Andrzej Pettyn sur 6 p. resumas la E-tradukojn de verkoj de Sienkiewicz; Lidja Zamenhof sur 5 p. mallonge skizas la verkon de Sienkiewicz. Noveloj:

Lux in tenebris lucet (Lumo en malhelo brilas) estas komponaĵo pri longdaŭre malgaja malespera artista vivo kaj ties fino.

La maljuna servisto estas monumento por tipo de strangulo, kiu jam ne plu ekzistas: Nobela servisto konstante grumblante postulanta absolutan devoplenumadon, pri kiu li mem donas absurdan ekzemplon, sed same absolute fidela kaj amplena al „sia" familio.

Dioklo estas malnova mito. Serĉante la plej altan veron, Dioklo perdas la mondon kaj ĉion, kio estas valora en ĝi.

Estu benita! (Hinda legendo)

La saĝa kaj granda Krišna kreas enkarnigitan lotuson el siaj deziroj kaj donas al ŝi (ĉar ĝi fariĝis ŝi) konsilojn, kiel vivi en la koro de poeto.

La anĝelo. Al dekjara knabino, kies patrinon oni ĵus entombigis, kamparaninoj promesas anĝelan protekton. Jam sur la vojo hejmen la etulino renkontas anĝelon, sed kruelan.
Sienkiewicz estas ĝenerale konata mondfama verkisto. Liaj noveloj estas bildoj kaj muziko samtempe. Profunde li prilumas homajn kondutmanierojn, emociojn, pasiojn, kiuj destinas la sorton. La esprimriĉan belan lingvon bone respegulas la Esperanto de Lidja Zamenhof.

Monika Ludewig

Esperanto-Briefmarke erschienen
Anläßlich des 100jährigen Jubiläums des Esperanto erschien in der DDR am 7. Juli 1987 ein Sonderpostwertzeichen: Ein Block zu 0,85 Mark. Die Marke ist in kleinen Mengen (max. 3 Stück) beim Esperanto-Verband (Otto-Nuschke-Straße 1, Berlin, 1080, Telefon 2 82 63 43) erhältlich.

„Plaŭ! Plaŭ!" Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, adaptita kaj ilustrita de Jang Šjaučun 1985, 54 p.

Tri kunikloj, ludantaj ĉe la lago subite aŭdas laŭtan bruadon. Tiu ĉi „Plaŭ!" ektimigas ilin tiel, ke ili haste forkuras kaj survoje terurigas ĉiujn renkontitajn bestojn. De besto al besto la menciita monstro kreskas. Nur la kuraĝa rano pruvas, ke la „PlaŭJ" nur kaŭzas en la lagon falintaj papajofruktoj. Ĉiuj ridas, eĉ honteme la tri timenaj kunikloj.

Interese la ĝis nun tute nekutima maniero desegni. La bestoj, same kiel infanludaĵoj havas ekz. artikojn fiksitajn per videblaj ŝraŭboj. La ĉirkaŭaĵo estas stilizita. Kiel mi provis ĉe infanetoj, ili emfazite akceptis tiujn bildojn, kiuj bonege akordas kun la du- ĝis trifrazaj tekstoj. Ĉiam staras okulfrape la ĉeftemo en la centro de la ilustrajoj. Trafe la verkisto videbligis la emociojn de la bestoj. La aŭtoro praktikas elegantstile la multvariajn esprimeblecojn de Esperanto. La libreto pro tio ofertas diversajn uzeblecojn por la Esperanto-instruado prefere por progresantoj.

Edeltraud Zettier

100 demandoj kun respondoj pri la bulgara virino. Eldonanto: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio 1986, 139 p., trad. el la bulgara: Nikola Aleksiev

En tiu ĉi broŝuro la Bulgara Esperantista Asocio prezentas la Esperanto-tradukon de respondoj al 100 demandoj pri la stato kaj la rolo de la bulgara virino en la nuntempa socialisma socio.

Neniam antaŭe mi trovis kaj legis ian legaĵon, kiu donas informojn tiel profunde, amplekse kaj tuŝante la plej multflankajn sferojn de la socia vivo de la virino, kiel en tiu ĉi broŝuro. Klare ordigita en alineoj ĝi informas pri la movado de la bulgaraj virinoj antaŭ 120 jaroj ĝis nun, pri la klereco, laboro kaj socia pozicio de la bulgara virino, pri la familio kaj familiaj rilatoj kaj pri la sociala rolo de la patro.

Ankaŭ se ŝajnas, ke la enhavo okupiĝas ekskluzive nur pri la bulgara virino kaj la familio, efektive ni ricevas informojn ankaŭ pri la likvido de la analfabeteco, pri senpaga edukado en lernejoj kaj universitatoj, pri egala salajro por egala laboro por viro kaj virino, pri la malpermeso de infanlaboro, pri la senpaga medicina priservado, pri la libereco de religia konfeso ktp. Demandoj al la malalta naskonombro en Bulgario kaj kio estas la kaŭzoj, kial la fianĉo ne pagas ajnan sumon al la gepatroj de la fianĉino aŭ demandoj de ĝenerala karaktero i. a. esprimas la multnombrajn problemojn, al kiuj sin dediĉas la socialisma bulgara ŝtato.

Kiam mi legis la broŝuron, mi opiniis, ke kelkajn strangajn kaj neordinarajn demandojn enhavas la broŝuro, ekzemple ĉu la graveda virino riskas perdi sian laborpostenon, ĉu en Bulgario ekzistis poligamio aŭ ĉu ekzistas en la familio materiala dependeco inter la geedzoj.

Sed intenco de la broŝuro estas, ke oni ankaŭ legu ĝin ne nur en socialismaj landoj. Multnombraj gastoj el diversaj landoj vizitas Bulgarion kaj la socialismajn landojn kaj ne konas niajn kondiĉojn kaj vivmanierojn. La broŝuro donas respondojn al 100 demandoj, al demandoj pri la bulgara virino, sed mi opinias, ankaŭ pri la socialismo en Bulgario, kompare al la aliaj socialismaj landoj.

100 demandoj ne povas prezenti ĉiujn sferojn, detalojn kaj problemojn de la bulgara virino, de la bulgara vivmaniero aŭ de la tutaj socialpolitikaj eblecoj por la homoj en Bulgario ĉar estas eble, ke en la momento en kiu vi legas la recenzon, la bulgara ŝtato povas publikigi novajn leĝojn por la bono kaj prospero de la bulgara virino, de la homoj de la socialisma bulgara ŝtato.

Se estas io kritikinda, tiam la fakto, ke la malkutimaj kaj malĝustaj vortodisigoj je la fino de la linioj, ne ĉiam ebligas fluan legadon. Mi nur dezirus, ke tre multaj geesperantistoj legu tiun ĉi broŝuron por konatiĝi kun la vivo, la pozicio de la bulgara virino, la vivo en socialisma ŝtato. Mi opinias, ke la broŝuro atingis la celon, prezenti la realan socialismon.

Monika Schrage

El Ĉinio

Ĉina Antologio 1919 — 1949. Eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1986. 145 x 215. 602 p.

Jen denove impresa frukto de la riĉa eldona aktiveco de Ĉina Esperanto-Eldonejo. Jam 1959 aperis ĉe Ĉina Esperanto-Ligo „Ĉina antologio" 1949 — 1959, 405 p. Ĉi-tiu volumo povas esti rigardata kiel antaŭiranta kolekto. Do ekzistas unu elekto el la plej bonaj specoj de la ĉina literaturo el 40 jaroj. Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu fondiĝis en la jaro 1981, planas la eldonon de pluaj volumoj, nome pri la 60a ĝis 80aj jaroj kaj same pri la ĉinaj klasikaj literaturaĵoj. Grandega entrepreno.

La volumo enhavas elekton el al nove evoluinta ĉina moderna literaturo, kiu formiĝis post la „Novkultura Movado de la 4a de Majo" kaj la „Literatura Revolucia" en 1919. La 55 verkoj, kiujn prezentas la volumo al la leganto, venas de 41 verkistoj.

La ĉefan parton formas elekto de 37 noveloj, i. a. de Lusin, Mau Dun kaj Bakin. Lusin estis la „ĉina Maksim Gorki", la fondinto de la moderna ĉina literaturo (1881 — 1936), cetere esperantisto. Alia esperantisto estas Bakin (1904 —), unu el la plej gravaj nuntempaj prozverkistoj en la ĉina literaturo, de kiu jam aperis 14-voluma verkaro. Bakin cetere tradukis la romanon „Printempo en la aŭtuno" de Julio Baghy en la ĉinan. Li nun estas la prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo. La volumo krome enhavas unu raportaĵon (Ŝja Jan), 5 eseojn kaj 12 poemojn.

Tre plaĉaj aldonoj estas tutpaĝaj ilustraĵoj kaj multaj vinjetoj. Biografiaj notoj pri la kontribuintoj kompletigas la gravan volumon. La tuta volumo tre digne prezentas la socian fizionomion kaj popolan vivon de la siatempa Ĉinio kaj suferojn, strebadon kaj batalon de ordinaraj ĉinoj. En tiu senco la antologio povas esti rigardata kiel spegulo de la ĉina socio en tiu tempo (1919 — 1949), kiel ni legas sur la kovrilo. Al la valora volumo ni deziras grandan disvastiĝon. D. B.

Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang. Eposo de Li Ĝji. Trad. Laŭlum. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1985. 41 p.

Prezentiĝas al la leganto popoleca rakonto en versoj pri la luktoj de la ĉinaj kamparanoj kontraŭ iliaj feŭdaj ekspluatantoj. Pere de la amhistorio de Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang, Li Ĝji prikantas la deziron de la popolo je justeco, amo kaj fruktodona, homeca laboro. Li pentras la bildon de bataloj okazintaj ĉirkaŭ la jaro 1930 kaj poste, en ĉina regiono proksima al la Granda Muro, en kiuj Komunista Partio de Ĉinio ludis gvidan rolon.

Iom miriga por eŭropa leganto estas la formo de tiu poemo. Por ni estas interesa fenomeno, kiel interplektiĝas en tiu verko aktualaj eventoj (la originalo publikiĝis en 1946), eĉ nomoj kiel „Kompartio" kaj aliaj, kaj poeziaj tradicioj, tiel ke, je la unua rigardo, oni kredas la eposon skribita antaŭ multaj, multaj jardekoj. Al tio kontribuas ankaŭ la riĉa lingvaĵo, kiu en multaj komparoj ĉerpas el la naturo kaj el la ĉina proverbaro.

Temas pri popola liriko, nomata Xintianyou (pr.: ŝintjanjoú), kiu al Esperanto tradukiĝas per duversaj strofoj konsistantaj el du sesjamboj kun virina fino. Sed ĝuste tiun versformon G. Waringhien en sia „Skizo de Esperanta Metriko" pro ritmaj kaŭzoj opiniis netaŭga, eĉ „proskribenda" por Esperanto (Parnasa Gvidlibro, 2-a eld., PEA kaj „Heroldo de Esperpanto", 1968, p. 39). Krome, pli ol 700 fojoj ripetiĝas la sama ritmo, preskaŭ sen neregulecoj, kio eĉ en la plej interesa sceno iom ĝenas la leganton, kaj kio devigis la tradukinton kelkloke konstrui strangajn frazojn („post po tri diroj skurĝo faris karnoŝiron", „Pro l'atakant-multeco kaj pafad-intenso/sinjoro Cuj decidon ŝanĝis en la menso.").

Tamen mi rekomendas la libron, ne nur pro ĝiaj bela aspekto kaj valoraj ilustraĵoj, pri kies kreinto bedaúre mankas la indiko.

Ulrich Becker

Tajĝiĉjŭan

Ĉu vi ŝatas gimnastikajn ekzercojn por preventi aŭ kuraci malsanojn? Aŭ ĉu vi estas adepto de la hinda filozofia jogo, regule praktikanta ties kelkfoje streĉajn aplikaĵojn? Sub la supre nomita titolo informas la „Ĉina Esperanto-Eldonejo" Pekino, pri speciala kuracmetodo, kiu evoluis el la ĉina luktarto, uzita jam de post pli ol 300 jaroj. La publicita 64-paĝa libreto priskribas detale la karakterizaĵojn de tiu sistemo, ilustras perhelpe de 147 bildoj ĉiun opan korpan movon.

Diference de la konataj gimnastikaj metodoj tajĝiĉjŭan distingiĝas per la aparta avantaĝo, ke la movoj ne estas streĉaj, sed mildaj, nature harmoniaj. Ĝi ne nur proponas movojn de la muskoloj kaj artikoj de la tuta korpo, sed ankaŭ koncentradon de la spirito. Ĝi helpas konscie regi la spiron kaj pensadon, postulas akordigon inter la konscio, spirado kaĵ korpa movado.

Jam en la kvindekaj jaroj la Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko rekomendis tajĝiĉjŭan al la tuta Ĉinio. Nun ĝi fariĝis kuracremedo en la klinika praktiko. La Pekina Instituto de Sporta Medicino faris detalajn esplorojn kaj konstatis favorajn influojn kiujn tajĉiĉjŭan efikas kaj sur la korpa konstitucio kaj sur la nerva sistemo. Ĝi estas aprobita kiel bona fizika terapio por suferantoj de kronikaj malsanoj, estas vera saniga sporto konforme al la fiziologiaj reguloj. La enketoj montris, ke konstanta ekzercado konservas la movpovojn.

La eldonaĵo meritas atenton. La teksto estas bonstila, facile legebla kaj senerara. Sendube ĝi permesas profiti por eventuala kompletigo de ĝisnunaj samcelaj kuracadoj.

[Tajĝiĉjuan. Ĉina Esperanto Eldonejo. Pekino 1986, 64 p.]

Erich Würker

Laste aperis

(nur bibliografio, ne librooferto!)

— Alta akvo, La, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 129 p. 20 cm. ISBN 963 571 159 X. Romano pri la timo, de unu el la plej produktivaj verkantoj de originala Esperanta literatura prozo.

— Elektitaj fabeloj, Jakob kaj Wilhelm Grimm. El la germana trad. (1906) Kabe (Kazimierz Bein). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985 (2a fotorepreso de la unua eld.). 6 + 199 p. 19 cm. Bind. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 10. Fama fabelkolekto de la Fratoj Grimm en la klasika traduka.

— Esperanta konversacio 1, Li Shijun (Laŭlum, 1923). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6 + 184 p. 15 cm. Laŭteme dividita gvidilo de frazoj kaj vortoj en Esperanto kaj la ĉina por konversacio de komencantoj.

— Esperanto kaj literaturo (1979), Valo (pseŭd.). Laroque Timbaut: Laŭte!, 1986 (represo). 18 p. 21 cm. SAT-Broŝurservo. Artikolo el Sennacieca revuo, kun konsiloj por verkemuloj.

— Esperanto-movado en Ĉinio, Hou Zhiping (1937). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 164 + 28 p. Ilus. 19 cm. Ĉinlingva historio kun 28 paĝoj da nigra-blankaj fotoj.

— Generalo Bananan: Unuakta komika opereto (1924), Miyazawa Kenzi (1896 — 1932). El la japana trad. Takesita Tokio (ps. Bam Buo, 1913). Numazu: Biblioteko Kolombo, 1983. 39 p. Kolorbildo, muziknotoj. 20 cm. Unu el malmultaj dramoj de elstara fabelverkisto, pri la senutilo de la milito, kun porprezentaj indikoj.

— Helpilo por lernado de Esperanto. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 8 + 264 p. 19 cm. Gramatikaj esploroj, analizoj k. a. por ĉinlingvaj lernantoj, tute en la ĉina.

— Kavo (1943), Ivan Goran Kovačić (1913). El la kroata trad. Božidar Vanĉik. Varaždin (Jugoslavio): Esperanto-societo, 1985. 30 p. 20 cm. Dek kantajoj, verkitaj en sesversaj strofoj, pri la suferoj de martiro: „krio de libero kaj espero", kun antaŭparolo kaj komentario.

— Kio estas Esperanto?/Ni zhidao shijieyu ma? Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6 + 119 p. 19 cm. Ĉinlingva informlibro pri la Internacia Lingvo.

— Lernolibro de Esperanto/Shijieyu jiaocheng, Wei Yuanshu k. a. Ŝanhajo: Ŝanhaja Fremdlingva Eduka Eldonejo, 1985. 2 + 357 p. Tridek-leciona lernolibro, aparte por la studado de Esperanto kiel dua, nedeviga lingvo en ĉina altlernejo; kun Esperanta-ĉina vortlisto kaj ŝlosilo al ekzercoj.

— Maga peniko, Han Ŝing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 40 p. (nenumeritaj). Kolorilus. de Li Ŝiĝji. 21 cm. Fabelo pri peniko, kies pentrajoj iĝas vivaj.

— Malgranda monografio pri Esperantaj prepozicioj (1936 — 39), Ossaka Kenji (Ossaka Kenzi, 1888 — 1969). El la japana trad. Zhou Li. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6 + 109 p. 19 cm. Ĉinlingva studo pri prepozicioj por lernantoj de Esperanto; adaptita el la La revuo orienta.

— Malnovaj rakontoj en la urbo Ŭakajama (1982), komp. Kôsaka Zyirô, Itô Takahumi, Ibaragi Atumi. El la japana trad. Tanaka Masami, Hatanaka Hirosi, Egawa Harukuni. Wkayama: Ŭakajama-Triopo, 1985. 105 p. Ilus. de Iwaki Hisa. 26 cm. Dudek tri rakontoj el la japana urbo Wakayama.

— Noveloj, Henryk Sienkiewicz (1846 — 1916). El la pola trad. (1925) Lidia Zamenhof (1904 — 1942). Varsovio: Eldon-Kleriga Centro Ritmo, 1985 (represo de la eld. de 1925). 2 + 65 p. 18 cm. ISBN 83 7013 011 9. Ses noveloj de la fama pola Nobel-premiito; kun enkonduko de Andrzej Pettyn.

— Verso kaj larmo; Elektitaj poemoj, Eli Urbanová (1922). Saarbrücken: Artur E. Iltis. 1986. 87 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 8. La tria originala poemaro de la aŭtorino en Esperanto, kun novaj poemoj kaj elektitaj represoj el ŝiaj pli fruaj poemaroj.

— Volapük oder Weltsprache (1884), Arthur Näther. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985 (represo). Jubilea Eldonserio: 4 Interlinguistik 5. 2 + 12 p. 21 cm. Prelego „Volapuko aŭ mondlingvo"; kun postparolo de R. Haupenthal (tute germanlingva).

— En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj; Gvidlibro, Vilma S. Eichholz (1926). Bailieboro (Kanado): Esperanto Press, 1986. 150 p. + folio. Ilus. Mimeo. 21 cm. ISBN 0 919 186 26 2. Divers-enhava ero en kurso por instrui Esperanton per kantoj, teatrajoj, ludoj ks. al 12-ĝis 14-jaraj gejunuloj.

— En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj; Paroligiloj, Vilma S. Eichholz (1926). Bailieboro (Kanado): Esperanto Press. 1986. 78 p. (nenumeritaj). Ilus. Mimeo. 21 cm. ISBN 0 919 186 28 9. Bildoj, kartoj, desegnaĵoj ks. kiel ero en kurso por instrui Esperanton al infanoj.

— Esperanto-katalogo de la libroj brajlaj, kiujn posedas la porblindulaj bibliotekoj en Nijmegen, Amsterdam kaj Den Haag (Hago). Nijmegen: Le Sage ten Broek Bibliotheek, 1986 (ne indikita). 2 + 15 p. 30 cm. Nigrapresa katalogo en Esperanto.

— Esperanto-katalogo de la sonlibroj, kiujn posedas la porblindulaj bibliotekoj en Nijmegen kaj Den Haag (Hago). Nijmegen: Le Sage ten Broek Bibliotheek, 1986 (ne indikita). 2 + 20 p. 30 cm. Nigrapresa katalogo en Esperanto.

— Esperanto: Einführung in die internatioale Sprache/Enkonduko en la Internacian Lingvon, R. Imbert k. a. Graz: Arbeitsgemeinschaft Österr. Esperanto-Lehrer/Internacia Kultura Servo, 1984. 65 p. 21 cm. Lernolibro por germanlingvaj komencantoj laŭ la „Zagreba Instrumetodo", surbaze de la 500 plej oftaj radikoj, kun i. a. ekzercoj kaj

solvoj, dudirektaj vortlistoj kaj gramatikaj informoj.

— Internacia lingva komunikado en la eklezio kaj nuntempa mondo, Georgo Korytkowski. El la pola trad. Cz. Bredulski. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio/Eldon-Kleriga Centro Ritmo, 1986. 89 p. 20 cm. ISBN 83 7013 020 8. Traktaĵo pri internacia komunikado en la romkatolika eklezio, kun antaŭparoloj de M. D. Chenu kaj W. Miziołek.

— Kiel organizi internacian junularan kongreson (1972), red. Thomas Bormann kaj Jan Koszmaluk. Roterdamo: Komisiono pri Aktivula Trejnado de TEJO, 1986 (2a reviziita eld.). 32 p. 21 cm. „Broŝuroj por Esperpanto-aktivuloj", n-ro 1. Utilaj konsiloj ankaŭ por aliaj renkontiĝoj.

— Konversacia manlibro pri Universala Kongreso de Esperanto, Zhu Mingyi (1936). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 202 p. Ilus. 19 cm. Dulingva: Esperanto-ĉina. Praktika informilo pri la historio, ĉefaj programeroj, proceduroj ks. de la fenomeno de Universala Kongreso, kaj specife pri tiu en Pekino.

— Politika ekonomio de interlingvistiko; La: Du prelegoj (1980), Jonathan Pool (1942). Paderborn: Universität/GH Paderborn, Inst. für Kybernetik, 1986 (represo, ne indikita). 3 + 19 p. Du referaĵoj el la 3a Int.Konf. pri Esperantologio: „Lingva egaleco, lingva malegaleco kaj lingva diskriminacio: Problemoj de konceptado kaj mezurado" kaj „La ekonomiaj avantaĝoj de planlingvo: Decidteoria perspektivo"; kun bibliografioj kaj tabeloj.

— Sferoj — 4; Sciencfikcio kaj fantasto, div. Komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: aŭtoroj. Pluraj tradukintoj el div. lingvoj. la kompilinto/Grupo Nifo, 1986 (ne indikita). 128 p. Ilus. 19 cm. ISBN 84 398 5753 5. Dek du sciencfikciaj rakontoj, kun la kutima bela prezento de la serio.

— Socialisma memmastrado; Evolutendencoj de la politika sistemo, Edvard Kardelj (1910 — 1979). El la serbokroata trad. Lucija Borčić. Beogrado/Sarajevo: Aktuelna Pitanja Socializma/Jugoslavia Esperanto-Ligo, 1986. 259 p. 20 cm. Traktajo de grava jugoslava marksista pensulo kaj teoriisto, kun glosaro.

— Akademiaj studoj 1986, red. Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. 304 p. 29 cm. ISBN 0 919 186 30 0. Kolekto de esperantologiaj studoj kaj artikoloj, ĉefe represaĵoj, de 18 aŭtoroj.

— Artificial Language Movement, The, Andrew Large. Oxford: Basil Blackwell, 1985. 240 p. 24 com Bind. ISBN 0 631 144 978. Historio de la internacilingva movado kaj priskribo de la plej gravaj lingvoprojektoj.

— Aŭtobiografio de bakterio (1936), Gaŭ Šiĉji (1905). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 110 p. 18 cm. Rakonto pri bakterio vojaĝanta tra homa korpo, verkita de fama sciencpopulariga aŭtoro.

— Bibliografio de la publikajoj de Reinhard Haupenthal; Suplemento 1980 — 1986, Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 12 p. 20 cm.

— Buchenwald. El la germana trad. G. Hornbogen k. a. 1985 (neindikita). 36 p. Ilus. 21 cm. Raporto pri la koncentrejo.

— Ĉina antologio (1919 — 1949). Diversaj tradukintoj. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 602 p. Ilus. 21 cm. Bind. 55 literaturaĵoj (noveloj, raportajo, eseoj kaj poemoj) de 43 plej reprezentaj verkistoj de sia tempo.

— Ĉinaj familiaj pladoj. El la ĉina trad. Liú Cajŝeng. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 69 p. Ilus. 18 cm. Feniksa libraro. Receptoj de ĉinaj specialaĵoj.

— Ĉinlingva konversacio, komp. Lu Ĉûanbjaú (1938). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 72 p. 18 cm. Frazlibro por kutimaj turistaj bezonoj. kun indiko de la prononco.

— Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov 1896-01-15. El la rusa trad. E. Ševĉenko kaj L. Novikova. Moskvo: Eldonejo de Presagentejo Novosti (APN), 1986. 14 p. 19 cm.

— Enciklopedio de Esperanto, (1933 — 35), red. L. Kökény (1897 — 1985), V. Bleier (1903 — 1940), K. Kalocsay (1891 — 1976), I. Širjaev (1877 — 1933). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986 (fotorepreso). 600 p. 24 cm. Bind. ISBN 963 571 164 6. La plej riĉa movada konsultlibro produktita antaŭ Esperanto en perspektivo.

— Esperanta ĥorkantaro. Motala: Motala Esperantoklubo, 1985. 14 p. 27 cm. Muziknotoj kun tekstoj de 12 kantoj, i. a. pri Esperanto.

— Esperanto; Lernolibro de la Internacia Lingvo. B-daŭriga kurso, Div. aŭtoroj. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1986. 42 p. 20 cm. Klarigoj kaj vortlistoj en Esperanto kaj la kroatserba. Progresiga lernolibro en la serio de la zagreba metodo.

— Esperanto keele ópik (1973), Jaan Ojalo (1914). Tallinn: Valgus, 1986 (2a eld. reviziita). 182 p. 20 cm. Bind. 27-leciona lernolibro kun instrukcioj por instruisto kaj ampleksa vortaro Esperanto-estona.

— Esperanto-societo „Bude Borjan"; 1945 — 1985, Div. aŭtoroj. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1985. 20 p. 20 cm. Historieto en la lingvoj kroatserba kaj Esperanto.

— Esperanto; Za šole in tečaje, I-a parto, Rudolf Rakuša. Ljubljana, 1984. 180 p. 20 cm.

— Ĝardenfesto kaj la Insulo de Voĉoj, La; Katherine Mansfield kaj Robert Louis Stevenson. El la angla trad. E. Lymburn (La Ĝardenfesto) kaj R. Dearnley (La Insulo de Voĉoj). Wellington: Nov-Zelando Esperanto-Asocio, 1985. 22 p. 21 cm.

ČSSR

38 j. esperantisto serĉas senedzan gajan samideaninon el GDR, 25-35j. por korespondado k renkontiĝoj en GDR aŭ Ĉeĥoslovakio: Gustav Heczko, Výškovická 63, **704 00 Ostrava-Zábřeh.**

Pollando

30j. ĵurnalisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Damian A. Zaczek, ul. Daszowska 2/5, **04-354 Warszawa**

Komencantino, 25j. instruistino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, historio, kol. bk: Gražyna Urban, **08-110 Siedlce,** str. Chrobrego 6 m. 54

Maria Sperra, **77-424 Zakrzewo,** dez. kor. tutmonde kol. pm.

36j. instruistino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Ewa Nagórska Majewo **83-133 Gasiorki**

39j. instruistino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, historio, folkloro, ktp. bk: Jożefa Pokusa, **93-217 Łodz,** str. Morcinska 6 m 148

Komencanto, 28j., dez. kor. tutmonde pri historio, turismo, poezio: Jerzy Kopczyński, Zdziav Wielki, **09-440 Staroźreby**

25j. ŝoforo dez. kor. tutmonde pri literaturo, sporto, enigmoj, kol. pm: Bociaga Zdzisław, **98-300 Wieluń,** ul. Sieradzka 51

Lernantino, 15j., dez. kor. p. ĉ. t., kol. pm, bk, kalendarojn; Adriana Królikowska, ul. Dembowskiego 7/27, **38-500 Sanok**

Klubo de Internacia Libro kaj Gazetaro ekligos kunlaboron kun ĉiuj kluboj, grupoj k. izolataj esperantistoj, kiuj dez. kor. aŭ vere kunlabori kun ni, E.-lingvan informilon ni sendos al ĉiuj volontuloj: Klub MPiK, Esperanta Sekcio, ul. Westerplatte 19, **65-034 Zielona Góra**

26j. laboristo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. sonbendojn: Andrzej Mazur, str. Dluga 33/12, **66-210 Zbaszynek**

Junulo, 20j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, turismo, montturismo, skiado: Jacek Golaczyński, **58-506 Jelenia Gora,** ul. Kolberga 3/94

26j. instruistino dez. kor. kun germanoj pri vojaĝoj, sporto, folkloro: Beata Lewnadowska, ul. Gwiadzista 3/28, **66-408 Gorzów Wihp.**

Komencanto, 27j. laboristo dez. kor. tutmonde pri turismo, geografio, fotografado, sporto, kol. bk., pm: Andrzej Butkiewicz, Jasionowo, **16-411 Szypliszki**

Magdalena Strusińska, ul. Warszawska 5 m. 9, **05-075 Wesola,** (26j.) dez. kor. pri literaturo, arto, turismo diversaj religioj

Krystyna Popierz, ul. Slowckiego 23 m. 3, **Poznań 2,** (24j.), dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde

Soveta Unio

Juozas Abramavičius, Topoliu 4-41, **234 580 Alytus-3,** Litovio, 24j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, pośkalendaretojn, diskojn

20j. studento dez. kor. tutmonde pri muziko, junulara vivo, filmoj, tekniko, kol. bk, pm, diskojn: Saulius Smelinskas, Prienu 5, **234 365 Stakliškés,** Prienu raj., Litovio

Vilija Abramavičiene, Topoliu 4-41, **234 580 Alytus-3,** Litovio, 23j. dez. kor. tutmonde pri ĉiutaga vivo, arto, muziko, modo, kol. bk

Arunas Žuvininkas, Prienu 13, **24 365 Stakliškés,** Prienu raj., Litovio, 20j., dez. kor. p. ĉ. t., tutmonde

Komentcantino, 43j., dez. kor. pri literaturo, muziko: Helgi Goots, **202 100 Rakvere,** str. Pika 39b, Estonio

20j. studentino dez. kor. tutmonde pri popolkutimoj, belliteraturo, vivo, filmoj: Helena Gajjutene, **Smolensk-18,** ul. 2 Kievskaja d. 6, kv. 2

18j. studentino dez. kor. tutmonde pri kulturo, historio, filmoj: Jula Babuŝkina, **Smolensk-35,** ul. Sokolovskogo d. 13, kv. 212

Sergej Černyt, Krymskaja obl., **gorod Jalta,** ul. Moŝkarina d. 10, kv. 3, (14j.), dez. kor. pri mod. muziko, fantastika literaturo, kol. pl, bk

Palaco de pioniroj KUD „Pomarka", **Harkov-2,** str. Sumskaja 37, dez. kor.

Junulino, 16j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj p. ĉ. t., kol. bk: Asta Poželaité, **234 430 Jurbarkas,** Douelaičio 66, Litovio

Granda grupo de komencantoj, 13 — 56j. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., skribu al E-klubo, **235 000 Jonava,** a. d. 7

Komencantoj, gestudentoj 17-18j., dez. kor. tutmonde. Skribu al: Galina V. Kuĉumova, **443 058 Kuibyŝev-58,** ul. Pobedy 83, kv. 51

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Otto-Nuschke-Str. 1
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16